Noto de transskribinto:

En la originala libro aperis listo de preseraroj. Ĉiu el ili mi korektigis en ĉi tiu teksto, kaj krom aliaj ĝustigaĵoj, registriĝis per html-aj komentoj. Ankaŭ originalajn paĝkomencojn mi simile registris.



A. RIVIER.

EN RUSUJO

PER ESPERANTO.

MOSKVA LIBREJO „ESPERANTO".

26, Tverskaja, 26, Moskvo, Rusujo.

Bohemujo, F. TOPIC, Ferdinandova 11, PRAHA.—Brazilio, FR. ALVES Y.Ca, 166, rua do Ouvidor, RIO DE JANEIRO.—Danujo, HOST & SON, Bredgade 37, KJÖBENHAVN.—Francujo, LIBRAIRIE HACHETSE & Cie, 79, Boulevard Saint-Germain, PARIS, Librairie de l'Esperanto, C. WARNIER & Cie, 15, Rue Montmartre, PARIS. Germanujo, MÖLLER & BOREL, Lindenstrasse 18-19, BERLIN S. W.—Granda Britujo, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Museum Station Buildings, 133—6, High Holborn, LONDON W. C.;—Hispanujo, J. ROSALS, Puerta, 30, BARCELONA.—Hungarujo, KOKAI LAJOS, Károly-utca 1. sz., BUDAPEST, IV.—Svedujo, C. E. FRITZE, Fredsgatan, STOCKHOLM.—Svisujo, UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO, 10, Rue de la Bourse, GENÈVE.—Usono, AMERICAN ESPERANTIST Co., Fortieth street 236, CHICAGO, kaj FLEMING H. REVELL, Co, 158 fifth Avenue, NEW-YORK.

Prezo 60 kop. (Sm. 0,63).

A. RIVIER.

EN RUSUJO
PER ESPERANTO.

LIBREJO
"Esperanto".
26, Tverskaja, Moskvo,
Rusujo.

Книжный Магазинъ
"Эсперанто".
26, Тверская, Москва,
Россія.

М О С К В А .

Тип. П. П. Рябушинскаго, Страстной бульв., соб. домъ.

1911.

En Rusujo per Esperanto.

Per tiu ĉi rakonto, mi certe ne pretendas malkovri antaŭ la tutmonda esperantistaro la misterojn de nekonata lando. Se ne ofte, ĝis nun, la turistoj vizitas la moskovan imperion, tamen la revolucio, antaŭ ne longe okazinta, altiris sur ĝin la atenton de la fremdularo, kaj multaj libroj aŭ revuoj pli malpli ĝin konigis al la legantaro. Ankaŭ mi ne intencas malkaŝi por la mondo la kaŭzojn, kondiĉojn kaj rezultatojn de la rusa krizo: tia ambicio estus tute ridinda ĉe simpla ekskursisto, kiu vivadis nur dum ses semajnoj en unu parto de la vastega Rusujo.

Mia deziro estas tute alia, malpli alta, sed verŝajne, pli interesa por niaj samideanoj. Mi faris eksperimenton esperantistan. Mi, per tre modestaj rimedoj, sen la helpo de ia ajn Cook'a agentaro, de ia ajn interpretisto, kvankam mi tute ne sciis la rusan lingvon,—sukcesis veturi el mia urbo, Alĝero, en Rusujon, kaj tie restadi, kiel mi jam diris, dum unu monato kaj duono; tie mi ĝuadis la plezuron de nekutimaj impresoj kaj senĉesaj surprizoj antaŭ homoj kaj aĵoj por mi tute novaj,—kaj, kune, mi sentis min komforte, libere, senĝene, kaj hejme, kvazaŭ mi estus en mia familio! Tian situacion tute apartan mi ŝuldis nur al Esperanto, konstanta perilo de miaj rilatoj kun miaj ĉirkaŭantoj!

Ŝajnas al mi utile konigi la kondiĉojn de tiu eksperimento, la specialajn impresojn de tiu peresperanta vojaĝo, la rezultatojn, kiujn mi atingis. Jen kion mi celas per tiu rakonto.

Antaŭ ol komenci, mi devas fari du ĝeneralajn rimarkojn. Unue, ĉar mi vizitis nur parton de Rusujo, kiu estas tre diferenca laŭ siaj provincoj, mia priskribo koncernas nur la regionon de mi vizitatan. Due, mi faris mian vojaĝon dum la somero de 1905; miaj turistaj rimarkoj ne povas do aludi la ŝanĝojn, okazintajn poste en tiu lando.

I.

L' ideon de tiu vojaĝo mi ne havis mem; ĝin al mi donis rusa korespondanto, kiu, post trijaraj leteraj rilatoj, estis iĝinta mia bonega amiko. La priskribo de niaj landoj tiel malsimilaj estis unue la precipa temo de niaj nepersonaj leteroj; sed, iom post iom, ni malkovris unu al la alia nian pensmanieron, nian familian kaj hejman rondon, nian privatan kaj kutiman vivadon, kaj, ĉar la simpatio ne sentas interspacon, okazis, ke ni, perleteraj konatuloj, amikiĝis pli intime ol multaj homoj, kiuj renkontas unu la alian ĉiutage. Tiu situacio estis iom malordinara. X. de Maistre, en sia noveleto: La leprulo de urbo Aoste, priskribas la strangan vivadon de du gefratoj lepraj, tute izolitaj de la cetera homaro, kiuj loĝas en apudaj, sed apartigitaj rifuĝejoj, dividitaj per muro aŭ kreskaĵbarilo, kiuj povas kunparoli kaj kunvivadi en senĉesa intimeco, sed neniam vidas unu la alian. Mia situacio, rilate al s-ro Speranskij, estis iom simila, kaj mi forte bedaŭris la barilon, inter ni metitan de la granda interspaco.

Tamen mi ne supozis tiun barilon transirebla, ĉar se la francoj ne estas plu tiom malvojaĝemaj kiom antaŭe, tamen Rusujo ne estas ĝis nun, pro sia malproksimeco, enirinta en la ordinaran sferon de iliaj ekskursoj. Cetere, la milito rusa-japana tiam estis en sia plej akra periodo, ribeletoj jam ekaperis en diversaj partoj de la imperio, antaŭsigno de ĝenerala eksplodo, kaj tiu cirkonstanco tute ne ŝajnis taŭga por plezura vojaĝo. Fine mi ne sciis la rusan lingvon, mia amiko ne parolis france; nia sola rilatilo estis Esperanto, kaj se ĝi estis sufiĉa por niaj leteroj, ĉu ĝi povis tiom taŭge ebligi parolajn rilatojn? Mi estis parolinta esperante nur kun francoj kaj, iafoje, kun unu anglo; s-ro Speranskij estis uzinta Esperanton nur kun siaj samlingvuloj. Povis esti, ke niaj prononcoj, tre malsimilaj, malebligus kunparoladojn. Kiam do li proponis al mi viziti lin en Rusujo, ĉar li mem, pro personaj kaŭzoj ne povis veturi en Alĝeron, tiu afero ŝajnis al mi, komence, tute ne efektivigebla.

Sed mia amiko protestis kontraŭ mia opinio, certigis, ke tiu vojaĝo estas tre farebla, ke, se necese, li min atendos sur la rusa limo; li donis al mi detalan vojiran planon, kun kelkaj rusaj frazoj, necesaj por la fervoja veturado, tradukitaj esperante, kun

prononco, montrata per esperantaj literoj. Sume, lia insisteco estis tia ke, helpata de mia mema dezirego, ĝi venkis mian ŝanceliĝon kaj mi decidis veturi al mia amiko.

Sumi, kie li loĝas, estas urbeto de la gubernio Ĥarkov, en la suda parto de Rusujo. Mi intencis veturi tien tra la haveno Odessa; tiel mi faros la pli longan parton de mia vojaĝo ŝipe kaj facile, kaj povos restadi dum kelkaj tagoj en Konstantinoplo, tiu fama ĉefurbo, en kiu sin miksas pentrinde ĉiuj rasoj de la okcidenta kaj orienta mondoj. Sed mia fervoja trairado tra la cara lando pli malkvietigis min, pro mia nescio de la lingvo rusa. Mi do skribis en Odessa al s-ro Gernet, konata verkisto de la unua esperanta literaturo, por peti kelkajn sciigojn. Li tuj proponis tre afable esti mia gastiganto, montri al mi sian urbon kaj meti min en la vagonaron, kiu veturigos min ĝis Voroĵba, kie min atendos mia amiko. Dank' al tiu kompleza helpo, ĉiuj lingvaj malfacilaĵoj estis malaperontaj, sed, ho ve! neatenditaĵo estis malordigonta planon tiel bone aranĝitan!

Mi forveturis el Marseille, la 20-an de majo 1905 per la franca vaporŝipo Iméréthée, kiu sin direktis senhalte al Konstantinoplo. Mi iom timis enui dum tiu sestaga mara vivado. Sed, kiam la gevojaĝantoj, post unutaga silenta kaj reciproka observado, fine decidis konatiĝi, ili rapide amikiĝis kaj ekvidis, ke estas agrablege ŝipveturi en ĝoja kaj simpatia rondo, tra la mirindaj vidaĵoj de la Mediteranea maro: la markolo Bonifaco, ŝajnanta kiel Danta infera pejzaĝo, kun ĝiaj danĝeraj ŝtonegoj, batataj de la ondaro; la markolo de Messina, sunhela inter du riĉaj marbordoj, kun ĝiaj antaŭe timegindaj rifoj Charybdis kaj Scylla[1], preter kiuj transveturis malestime nia ŝraŭbŝipo; la maro Arĥipelago, blua kiel la ĉielo, semita per insuloj, kiel ĝi per steloj, kiel ĝi, ankaŭ, plena da mitologiaj memoraĵoj; la mareto Marmara, kies facilajn ondetojn tuŝetas per siaj flugiloj la blankaj alcionoj; fine, ŝprucanta el horizonto, kiel Ĥimera teatraĵo, kun siaj nekalkuleblaj palacoj, preĝejoj, kupoloj kaj altegaj minaretoj, ĉiukolora sed precipe blanka, helega, sanktega, majestega, la reĝo de Oriento, la urbego de l' Ĉefo de l' Kredantoj, Konstantinoplo!

[1] Tiam, mi ne supozis, ke tri jarojn poste, terurinda katastrofo ruinigos tiun belegan landon.

Kial, ho ve! ĝi estas tiom malpura, kaj, ofte malbonodora! Kial ĝiaj loĝantoj tiel kortuŝinde konsentas por friponi la nespertajn vojaĝantojn? Kiam, internaciaj spesmila kaj spesdeka moneroj, vi anstataŭigos la multenombrajn turkajn monerojn, ĉiam valorajn, se vi ricevos ilin el kambiisto, sed ĉiam, ankaŭ, elkursigitajn, se, vice, vi deziras redoni ilin al enlandulo!

Pri Konstantinoplo mi ne parolos longe, unue ĉar tio ne estas la temo de tiu rakonto pri Rusujo, due, ĉar mi vizitis ĝin malbone kaj en tre netaŭga animstato. La duan tagon de mia ĉeestado, disvastiĝis la famo, ke subita revolucio ĵus eksplodis en

Rusujo. Mi kuris al la turka limimposta salono, petis informojn. Tie mi renkontis amason da ekscitegitaj homoj, kiel mi dezirantaj veturi en Odessa'on. Al iliaj insistaj demandoj la turkaj oficiroj nur mallonge respondis, kun mokema rideto, ke ili nenion scias, krom tio, ke de nun ĉiuj ŝipaj rilatoj kun Rusujo estas interrompataj. En la rusa konsulejo, simila lakonismo; oni ricevis min per sindetenema ĝentileco, kaj konsilis, ke mi atendu ĝis... nedeterminata tempo! Cetere nenia tiea gazeto eĉ aludis pri la rusaj aferoj, ĉar, tiam ne estis ankoraŭ okazinta la turka revolucio kaj la severega cenzuro malpermesis ĉiujn informojn pri io ajn kontraŭa je la principo aŭtokrata. Kiam la prezidanto Carnot, kaj, poste, la reĝo Humberto estis mortigitaj, la ĵurnaloj de Konstantinoplo raportis nur, sen plia komentario, ke ili "mortis subite"!

Kiel kutime, pro la manko de precizaj informoj, la fantazioj fervoradis. Greka kuracisto, kiu manĝis apud mi en mia hotelo, rakontis, ke la tuta Rusujo ribeladas, ke oni pafas eĉ kontraŭ la vagonaroj kaj fremduloj, ke li forte konsilas min forlasi mian projekton veturi nun en tian landon...

Imagu, kia estis mia situacio! Post longaj kaj detalaj antaŭpreparoj mi fine ĵus forvojaĝis tra la tuta Mediteraneo por viziti mian rusan amikon, mi jam estis malproksima je pli ol 3.000 kilometroj de mia patrujo, kaj ĵus atingonta mian celon, kiam subita malhelpaĵo min haltigis kaj devigis returnen iri! Mi ne povis submetiĝi je tiu mokinda kaj malesperinda konkludo. Aliparte, mi ne povis atendadi en Konstantinoplo la eble tre malfruan paciĝon de Rusujo. Kion do fari?

Fine, mi eksciis, per konfidenciaj informoj de la franca vickonsulo, kio reale okazis. Kirasŝipo Knjaz Potemkin kaj unu torpedoboato estis ribelintaj kaj pafadintaj kontraŭ urbego Odessa; pro tio estis malpermesate eniri en tiun havenon kaj en Sevastopol'on; oni diris, ke la suda parto de Rusujo estas revolucianta, ankaŭ Polujo. Eble inter tiuj ardejoj de agitado, apud la Rumana aŭ Aŭstra limo, estis pli kvieta regiono, tra kiu mi povus veturi al Sumi. Mi do tuj decidis iri ŝipe al Konstantza, rumana haveno kaj poste, per fervojo, tra Bukureŝti kaj Ĉernovic ĝis la aŭstra-rusa limo. Tiel mi ne povis profiti la sindonan helpon de s-ro Gernet en Odessa, kaj devis sen ia rimedo esperanta veturi tra Rumanujo kaj parteto de Aŭstrujo. Kredeble, sur tiu nova vojo, estis ankaŭ samideanoj. Sed mi ne sciis iliajn adresojn, kaj vane mi serĉis esperantistan jarlibron ĉe la librovendistoj de Konstantinoplo. Kiom mi bedaŭris, ke mi ne zorgis aĉeti en Francujo tiun utilegan libron, ĉar mi sciis nek la rumanan, nek la grekan, nek la germanan, nek la polan lingvojn, parolatajn en la landoj de mi traveturoraj.

Tamen, komence, min ne ĝenis mia lingva neklereco, ĉar mi havis la bonŝancon renkonti francon sur la vaporŝipo Reĝo Karolo I, kiu portis min al Konstantza. Mia sampatrujano veturis, kiel mi, en Bukureŝt'on, kaj kompleze estis mia gvidanto dum la tago, kiun mi pasigis en tiu ĉefurbo de Rumanujo.

Kia kontrasto kun Konstantinoplo! Tie mi sentis min en urbo vere eŭropa, ĉe libera popolo. Plu ne estis cenzuro, kaj fine mi povis, per francaj gazetoj, scii la detalojn de la ribelado en Odessa kaj Polujo. Nenia agitado estis anoncata proksime je la limo aŭstra, kaj mi esperis, ke mi povos eniri sen malfacilaĵo en Rusujon per la limurbeto Novosjedlic.

Kio plej frapis mian atenton, dum mia tre mallonga ĉeestado en Bukureŝti, estas la stranga kontrasto inter tiu urbo belega, antaŭema kaj tute civilizita, kaj la ĉirkaŭaj kamparoj ankoraŭ tre orientŝajnaj, kun ilia loĝantaro vestata per ĉemizegoj, ornamataj per pentrindaj ruĝaj brodaĵoj. Kelkaj detaloj, cetere montris la proksimecon de la orientaj moroj, antaŭ ne longe regantaj en Bukureŝti mem. Ekzemple, kuriozaĵo de tiu urbego estas ĝia veturigistaro. Ĵus alveninte la fremdulo rimarkas en la stacidoma placo sidantajn sur l' antaŭaĵo de belaj veturigiloj strangajn homojn, vestatajn per longa velura malhela kitelo apenaŭ vidiganta glazurajn botojn, kun silka zono delikate kolorigata, palblue, helflave aŭ rozkolore, kaj super tiu kvazaŭ virina vesto, sin montras dika, ruĝa, grasbrila, senhara vizaĝo, je stranga mieno, je pli stranga voĉo, kun abomena ŝirmilĉapo, simila je tiuj de la parizaj noktovagistoj! Tiuj—mi ne kuraĝas diri viroj!—estas Rusoj de la religia sekto "skopci", kiuj, opiniante, ke la volupto kaŭzas ĉion pekan, ŝirmis sin je ĉiam kontraŭ ĝi per operacio! Bedaŭrinde tiuj "blankaj kolomboj"—tiel ili sin nomas—deziras iafoje ŝirmi ankaŭ aliajn pekantojn, kaj perforte "kolombigas" ilin. Tial la rusa registaro ilin persekutas kaj sendas en Siberujon; tial, sekve, multaj kolomboj forflugas al Rumanujo, pli tolerema lando, kaj formas en Bukureŝti veturigistan korporacion. Do, per tiuj strangaj birdoj, mi havis mian unuan kontakton kun Rusujo!

Ĝis nun min ne estis malhelpinta la lingva demando, ĉar en Konstantinoplo multaj parolas france, kaj en Bukureŝti mia kunvojaĝanto estis mia tradukisto. Sed tie mi devis lasi lin kaj vojaĝi per miaj propraj rimedoj tra Rumanujo, iom tra Aŭstrujo, kaj fine tra la suda Rusujo ĝis Voroĵba, loko de mia renkonto kun s-ro Speranskij. Tial mi povis eksperimenti la utilegecon de lingvo internacia! Kiom da fojoj mi bedaŭris, ke mi ne povas sekvi mian peresperantan vojaĝplanon tra Odessa, kun la helpo de s-ro Gernet! Mi estis kvazaŭ surdmutulo, devigata veturi tra nekonata lando, sciante nek la precizan fervojan horaron, nek la daŭron de l' haltoj por manĝi, nek la ŝanĝejon de vagonaroj, ĉiam timante, ke mi eble sekvas malbonan direkton, kaj elvojiras. Kiu scios iam, kiom oni ŝtelis ĉe mi en Itzkani, sur la rumana-aŭstra limo, kiam mi devis doni al ia monŝanĝisto plenmanon de ĉiuspecaj turkaj kaj rumanaj moneroj, de mi ne konataj, kaj ricevi interŝanĝe ne malpli nekonatajn aŭstrajn monerojn?

En Ĉernovic, grava aŭstra stacidomo, mi devis halti, mendi vespermanĝon, aĉeti novan bileton por veturi al Novosjedlic sur la rusa limo, kaj ĉion fari per signoj!

Estis jam krepusko, kiam mi forveturis per vagonoj etaj kiel knabaj ludiloj kaj memorigantaj niajn francajn departamentajn vagonetojn. Mi staris sur l' ekstera plataĵo de mia veturilo kaj rigardis melankolie la pejzaĝon, ruĝe lumigatan, kvazaŭ de fajrego, de la lastaj radioj de l' suno ĵus malaperonta sub la horizonto. Nia vagonaro trapasis sur pontego tra la rivero Pruth, en kies akvoj nudaj knaboj, ruĝe kolorigataj, kiel diabletoj, de l' sunradiaro, petolis kaj faris al ni ŝercajn salutojn. Apud mi en la vagono kelkaj fraŭlinoj gaje babiladis manĝante bombonojn, kaj du junuletoj, en gimnaziaj uniformoj, kunparolis amike, observadante la pejzaĝon.

Stranga impreso de izoleco premadis mian koron. Ĉiuj ĉi tiuj gehomoj sentis sin hejme kaj komforte; kviete ili ĝuis la pacigecon de tiu krepusko kaj la dolĉecon de simpatiaj rilatoj kun siaj samuloj, nur mi estis sola en tiu fremda lando, kaj kvazaŭ apartigata de l' cetera homaro pro mia lingva malsimileco. Kun tiu melankolia sento sin miksis iom da maltrankviliĝo. Post kelkaj horoj, dum la venanta nokto, mi alvenos sur la limon de Rusujo, celo de mia dusemajna vojaĝego. Kia estos mia akcepto? Proksima estas tie la rusa Polujo, kiun la Bukureŝti'aj gazetoj montris tute revolucianta. Ĉu oni permesos min eniri kaj vojaĝi al mia amiko? La malhela nokto, kiu nun ĉirkaŭis min, ŝajnigis ankoraŭ pli malafabla, kaj malkvietiga tiun alproksimiĝon de la ne konata, misterplena lando. Kaj subite mia izoleco inter tiuj gehomoj gajaj kaj babilantaj iĝis al mi tute netolerebla kaj mi decidis rompi ĝin, iel ajn iam rilatiĝi kun ili, resti efektive ano de homa rondo...

Cetere mi bezonis informojn pri diversaj detaloj rilate al mia alveturo sur la rusa limo: la horon de mia alveno, la staton tiean de la ribelado, la formalaĵojn, postulatajn de la limgardistoj, k. t. p. Mi do aliris apud la ambaŭ gimnazianoj kaj alparolis ilin france: neniu komprenis. Per la lingvo angla, simila rezultato. Eblete, mi pripensis, ili komprenos la lingvon Esperanton?

Ho ve! tiu provo ankaŭ ne sukcesis. Tiam, incitate de l' bezonego, mi faris heroan memorpenadon, kaj ekparolis... latine! Cicero, vualu vian vizaĝon! Depost pli ol deksep jaroj, mi estis forlasinta la benkojn de liceo kaj ĉiun rilaton kun la latina literaturo. Plie, eĉ la Romanoj estus tre embarasataj uzi sian lingvon por paroli pri fervojaj kaj limimpostaj demandoj. Fine la aŭstraj gimnazianoj ne eldiras la latinajn vortojn kiel ni Francoj. Mi nerefuteble eksperimentis la netaŭgecon de tiu antikva idiomo por la modernaj rilatoj. La rezultato estis ridinda kaj preskaŭ nula. Tamen niaj reciprokaj klopodoj por kompreni unu la alian donis tiun efikon, ke mi sentis min malpli izola, kaj mi tre bedaŭris miajn kunvojaĝantojn, kiam ili lasis min en la aŭstra limstacidomo Novosjedlic.

Dek minutojn poste, nia vagonaro haltis definitive en la rusa stacidomo.

Mi neniam forgesos la fortan impreson de tiu nokta alveno, sur la sojlon de tiu lando, fine de mi atingatan, malgraŭ tiom da malfacilaĵoj. Anstataŭ la bruego, kutima al niaj okcidentaj stacidomoj, silento regis, dum ni staris kun niaj pakaĵoj, laŭ unu vico, en longa ĉambrego, antaŭ limpolicistoj, kiuj severe kaj esploreme observadis nin. Ŝajnis, ke ni estas aro de punlaborantoj, kondukataj en Siberujon! Cetere, inter miaj kunvojaĝantoj, eble, estis efektive forkurintuloj, provantaj reveturi nekonate en sian patrujon, kaj la policistoj de la rusa limo havas specialan flaradon por ilin malkovri. Kompreneble la ribelado en Polujo igis tiun inkvizicion ankoraŭ pli severa; tial, timante ian malfacilaĵon, mi decidis montri specialan administracian atestilon, kiun mi kunportis laŭ konsilo, al mi donita de la rusa konsulo de Alĝero, por pli faciligi, se bezone, mian vojaĝon en tiu lando, kie ĉiu regna funkciulo estas alte estimata. Mi do donis tiun atestilon, kun mia pasporto al limpolicisto, kaj klopodis komprenigi, ĉu france, ĉu geste, ĉu eĉ per kelkaj rusaj vortoj, antaŭe lernitaj parkere, ke mi estas ŝtatoficisto de la Alĝera gubernistejo.

Mia policisto aŭskultis ĝentile, sed skuis sian kapon por montri, ke li ne komprenas. Tamen la vorto gubernistejo altiris lian atenton kaj li ripetis demande per la rusa lingvo:

—Gubernia? Gubernia?

—Da! Da! (Jes! Jes!)—mi respondis.

Li salutis kaj iris al tri oficiroj, sidantaj antaŭ tableto en la ekstremaĵo de la ĉambrego. La oficirestro prenis mian atestilon, mian pasporton, rigardis longe kaj montris ilin al siaj kolegoj, kaj triope ili rigardis min. La limpolicistoj rigardis min ankaŭ, kaj ankaŭ rigardis min scidezire miaj kunvojaĝantoj.

Mi devas konfesi, ke mi sentis min tre ĝenata kaj sendis interne al ĉiuj diabloj mian decidon montri mian administracian atestilon kaj tiel altiri sur min atenton, eble malfidon, anstataŭ simple doni mian pasporton, kiel ĉiuj aliaj.

Fine, post momento, kiu ŝajnis al mi momentego, iu el la oficiroj venis al mi, salutis, redonis miajn paperojn kaj min alparolis... ruse.

Mi povis nur respondi, ke mi ne komprenas.

Vice, li ankaŭ diris, montrante mian atestilon.

—Gubernia? Gubernia?

—Da! Da!—mi diris.—Gubernia! Alĵir! (Alĝero!)

Tiam li ĝentile kliniĝis, geste komprenigis, ke mi ne bezonas malfermi mian pakaĵon, ordonis al portisto preni ĝin, kaj parolis al oficisto, kiu respekte salutis, kaj kondukis min al la rusa vagonaro, dum miaj kunvojaĝantoj estis devigataj liveri sian pakaĵaron je la severa inkvizicio de la limpolicistoj.

Tian mirindan efikon havis mia administracia atestilo, kaj iafoje mi suspektas, ke la rusa policistaro de Novosjedlic kredis, ke mi estas mem la ĝenerala registo de Alĝerio!

La fizionomio de la rusaj fervojoj estas tre speciala. La oficistaro, rigida en sia uniformo, faras la impreson de soldataro, sed, male la vojaĝantaro havas ŝajnon familian kaj hejman, kiu tuj altiras la atenton de la fremdulo. Tio devenas parte el la instaleco de la rusaj vagonaroj, multe pli komfortaj ol niaj francaj veturiloj. La rusa relvojo estas je unu triono pli larĝa ol tiuj de okcidenta Eŭropo; sekve, la vagonoj estas pli larĝaj kaj ankaŭ pli altaj. Ĉe iliaj ambaŭ ekstremaĵoj estas platformoj kun necesejoj-tualetejoj, kaj inter ili koridoro kun vitraĵoj, laŭlonge de kiu staras vico de vagonfakoj kun pordoj, kiuj ŝajnas kiel ĉambretoj kaj havas larĝajn remburitajn benkojn kaj tableton. Speciala sistemo de risortoj permesas instali super ĉiu benko, je duona alteco al la plafono, supran benkon ankaŭ remburitan. Tiuj du etaĝoj de benkoj, tute similaj je ŝipaj kuŝetoj, permesas, ke ĉiu vojaĝanto, eĉ en tria klaso, povu kuŝiĝi dum la nokto. Kutime la rusaj vojaĝantoj portas kun si kapkusenon kaj kovrilon, dank' al kiuj ili povas dormi kiel hejme. Kiam estas taglumo, la virinoj sidas ĉirkaŭ la tableto, kaj preparas en tekruĉoj la familian teon per bolanta akvo, aĉetita en la stacioj, dum la viroj faras, per speciala ileto, siajn bonodorajn cigaredojn. Se oni deziras esti tute hejme, oni aĉetas aldonan bileton, nomatan "plackarta", kiu donas la rajton sidi en aparta fako, kie neniu povas ĝeni vin; eĉ estas aparta fenestreto por la nepraj komunikoj kun la fervoja oficistaro. Eble tiun hejman impreson de la rusaj varonaroj pli fortigas la ĝenerale malrapida irado de la lokomotivo kaj ĝia tre orientŝajna malakurateco, kiu permesas, ke oni atendu pacience la bonvolon de ia altranga vojaĝanto, prokrastiĝanta apud bongusta glaseto da "vodka" (sekala brando) en la stacidoma bufedo!

Mi bezonis du noktojn kaj unu tagon por veturi tra la interspaco de la rusa limo ĝis Voroĵba. Mi vojaĝis tra senfina ebenaĵego bone kulturata, kun disaj lignaj vilaĝetoj, el kiuj malriĉaj muĵikoj (kamparanoj), vestitaj per botoj kaj longaj tulup'oj, venis al la fervojo rigardi nian transrapidantan vagonaron. Iliaj longbarbaj vizaĝoj esprimis bonecon kaj strangan miksaĵon de ruzemeco kun naiveco. Venis ankaŭ virinoj, iafoje beletaj, sed bedaŭrinde malgraciaj pro siaj pezaj botoj kaj la tuko, kiu envolvis ilian kapon. Kiam la vagonaro haltis, knabinoj kaj fraŭlinoj, diverskolore vestitaj, nudpiedaj, afable kaj timeme proponis al ni berojn kaj pomojn, dum bufetkelneroj alportis varmegan akvon por la teinfuzo.

Ĉio tio estis kvietega, paciga, tre malsimila je miaj antaŭaj supozoj. Apenaŭ mi povis kredi, ke mi estas en tiu lando, pri kies terura milito kontraŭ Japanujo kaj internaj ribeladoj la okcidentaj gazetoj plenigis siajn paĝojn. Je la unua fojo mi komprenis vere, kiom Rusujo estas vastega kaj ke malkvietiĝoj aŭ milito en kelkaj el ĝiaj partoj ne havas gravan rebaton sur la ĉiutagan vivadon de l' cetero de tiu kolosa ŝtato. Ĝia vastegeco estas samtempe ĝia plej bona defendo kontraŭ kataklismoj kaj barilo kontraŭ reformoj, la kaŭzo de ĝia kuna forteco kaj malforteco.

Tamen, se la loĝantaro ekstere estis pacema, eble ĝi ne estis interne tute kvieta kaj al mi ŝajnas, ke en mia vagonaro mi povis konstati ĝin. En Rusujo, kiel en Aŭstro-Hungarujo kaj en la orienteŭropaj ŝtatoj, ĝis nun ne fariĝis la kunfandiĝo de la tieaj rasoj. La parto de Rusujo, en kiu mi estis veturanta, iam estis submetata je Polujo, kaj en ĝi restas ankoraŭ multaj poloj, antaŭe landregantoj, nun iĝintaj, per la sorto de l' bataloj, nur regatuloj. Inter ili kaj la rusoj ne estas multa simpatio, kaj ili vivadas aparte, ĉiam parolante inter si sian nacian lingvon. En mia vagonaro estis kelkaj gepoloj, kiuj sidadis en speciala fako. Eĉ mire mi rimarkis, ke la virinoj kaj fraŭlinoj portis sub sia zono ponardeton en eleganta ingo, kvazaŭ ili estus inter malamikoj, kaj timus ian perforton; sed oni diris al mi poste, ke tio estas nur ornamaĵo, ŝatata ankaŭ de la rusaj sinjorinoj.

Cetere mia kunvojaĝantaro montris interesan miksaĵon de diversaj rasoj. Krom la rusoj, kiuj, kompreneble, estis plejmultaj kaj la pola rondeto, mi rekonis Hebreojn pro ilia tipo kaj sono de voĉo. Kelkaj germanoj, sidantaj fiere en angulo, rigardis iom malestime siajn ĉirkaŭantojn. Du tataraj komercistoj eniris en nian vagonon, kaj insiste proponis al ni diversajn ŝtofojn kaj juveletojn, parolante laŭvice ruse, pole, france, germane eĉ angle, ĉiam malkorekte kaj ĉiam trudeme.

Kiam ni alproksimiĝis je Kievo, la lando prezentis novan aspekton, kovrite per belegaj abiaroj, en kiuj sin montris iafoje pentrindaj lignaj somerloĝejoj. Kievon mi ne vizitis, ĉar mia amiko Speranskij, avertita telegrafe, atendis min en Vorojba kaj mi devis veturi al li senprokraste. Mi do haltis en la Kieva stacio nur unu horon por vespermanĝi en la bufedo kaj eniri en novan vagonaron.

Mi ĝis nun vidas en mia memoro la salonegon de la stacimanĝejo. Vastega landkarto de Rusujo, pentrita, kun la imperiestraj agloj sur muro, temaŝinego, staranta en la mezo de l' ĉambrego kaj ikono (sankta figuro), pendanta en angulo, pruvis al mi nerifuteble, ke mi fine estas en la cara ŝtato. Kaj kia stranga homamaso ĉirkaŭ mi! Uniformoj de oficiroj, uniformoj de soldatoj, uniformoj de oficistoj, uniformoj de lernantoj, de kadetoj, de gimnazianoj, eĉ de ortodoksaj pastroj—ĉie kaj ĉiel uniformoj! Ŝajnis, ke mi estas en ia soldatejo kaj mi sentis min preskaŭ ĝenata en miaj simplaj vestoj de vojaĝanto antaŭ tiu brila kaj multkolora uniformarego! En la triaklasa salono la uniformoj estis pli malmultaj, sed la loko estis ankoraŭ pli

pentrinda pro ĝia aro de laboristoj kaj muĵikoj. Kun humileco kaj timemeco, kiu strange kontrastis iliajn longajn barbojn, ili staris aŭ prefere sidis, kaj eĉ kuŝis kiel orientuloj apud la sakoj, kiuj enhavis iliajn tre modestajn posedaĵojn.

Kien veturis tiuj simpluloj malriĉaj embarasataj kaj de la bruego konfuzataj? Ĉu en urbegan fabrikejon por gajni la ĉiutagan panon, kiun rifuzas al ili la naskiĝa kampo? Ĉu en Amerikan landon por trovi la religian liberecon kiel la "duĥobori" de Tolstoj? Kaj tiu soldataro, ĉu ĝi atendis vagonaron por veturi malproksimegen, dum multaj kaj longaj tagoj, al tiu nekonata Manĝurujo, kie tiom kaj tiom da rusaj vivoj senutile perdiĝis? Kiom mi deziris paroli al tiuj homoj, scii, kiaj estas iliaj pensoj kaj sentoj! Sed, ho ve! netransirebla muro, la malsimileco de lingvoj, tute apartigis min de tiuj apuduloj, tamen similaj je mi!

Mia dua nokto sur la rusaj fervojoj pasis nerimarkeble. Mi sentis min laca kaj iom brutigata, kaj al mi ŝajnis, ke ĉiuj vagonaroj rumanaj, aŭstraj kaj rusaj ruliĝas samtempe en mia kranio. Tamen, la sekvantan matenon, kiam la stacidomo Voroĵba alproksimiĝis, mi forgesis mian laciĝon kaj sentis kontraŭe en mia spirito strangan malkvietiĝon. Post unu horo, mi fine renkontos mian esperantistan amikon, celon de mia dusemajna vojaĝo. La rekuraĝiga influo de nia trijara korespondado nun tre malfortiĝis. Ju pli mi alproksimiĝis, des pli nia perletera amikiĝo ŝajnis al mi nereala kaj fantazia. Inter tiuj rusoj por mi fremdaj, mia nekonita korespondanto, simila je ili, nun al mi ŝajnis ankaŭ fremda. Per leteroj oni montras sin neplene, kaj vole-nevole, precipe per siaj plej bonaj kaj plej kulturaj flankoj. Kia disreviĝo, se ni trovos nin efektive malsimilaj je niaj supozoj! Kaj al tiu unua antaŭtimo sin almetis dua pli grava ankoraŭ... Ĉu Esperanto, lingvo artefarita, estos taŭga por daŭraj rilatoj? Ĉu ni povos sufiĉe komuniki niajn ĉiuspecajn pensojn dum ĉiutaga kaj kelksemajna kunvivado? Fine, ĉu ni, parolantaj kutime lingvojn tiel malsimilajn, povos esti bone komprenataj unu de la alia, malgraŭ niaj naciaj akcentoj? Kiom malĝojige kaj mokinde estus, se ni, post tiom da tagoj kaj penadoj, renkontos fine unu la alian... nur por konstati, ke ni ne povas kunparoli...

Sub la influo de tiuj nedolĉaj pensoj, mi promenadis febre en mia vagono, preskaŭ bedaŭrante mian riskplenan entreprenon, kiam fajfego sonoradis... Jam ne estas plu tempo por bedaŭroj kaj ŝanceliĝoj—jen Voroĵba!

II.

Kvin minutojn poste mi staras sur la trotuaro, atendante, laŭ antaŭe aranĝita interkonsento, ke oni venos al mi... Mi rigardas ĉiuflanke, kiam el malantaŭe, du brakoj ĉirkaŭprenas min, iu kisas min laŭ la rusa kutimo, kaj aŭdiĝas ĝoja, amika voĉo, esprimanta al mi fratan bonakcepton. Apenaŭ mi povas respondi, ree mi estas

kaptata, forkondukata en alian vagonaron, kiu veturigos min en la urbeton de mia amiko, kaj sidintaj sur molaj kusenoj de rezervata vagonfako, ni komencas paroli...

Vivu Zamenhof! La bonega lingvo de nia majstro tuj aperigis sian praktikecon, kiel ĝi montris ĝin iom poste en Boulogne, kaj la sekvantajn jarojn, en Genève, Cambridge, Dresden, Barcelona kaj Washington. Mi jam diris, ke s-ro Speranskij ĝis tiam estis parolinta esperante nur kun samnaciuloj. Tamen mi tuj komprenis lin, kvankam li ne elparolis tre klare la diftongojn aj, oj, kaj, kiel ĉiuj malgrandarusoj, ofte intermiksis la sonojn g kaj h. Sed li parolis tre flue, kiel en sia nacia lingvo. Mi ankaŭ mirigis lin, ĉar mi tro malfortigis kelkajn kunmetitajn konsonantojn, kiel kv, kc, kaj, precipe, ĉar, laŭ nia franca kutimo, mi metis ofte la akcenton sur la lastan silabon de la vortoj. Sed ni, iom post iom, korektis tiujn difektaĵetojn, kiuj, cetere, neniam malhelpis nian reciprokan komprenadon. La sukceso estis plena—post kelkaj minutoj ni estis kunbabilantaj tre facile kvazaŭ ni estus samlingvuloj!

Ankaŭ miaj timoj pri la psikologia flanko de mia eksperimento rapide malaperis. Mi trovis mian amikon tia, kian mi supozis. De la komenco, nenia ĝeno estis en niaj rilatoj, kiuj estis tute liberaj kaj amikaj, kvazaŭ nia unua parolado estus nur la daŭrigo de antaŭaj paroladoj. Ni tuj aludis nian antaŭan korespondadon, kaj tio estis stranga impreso senti niajn spiritojn reciproke tiel konataj kaj kutimaj, dum niaj vizaĝoj sin rigardis je la unua fojo. Ni estis kiel du blinduloj, intimaj amikoj, kiuj iĝus vidantaj subite kaj rigardus unu la alian. Se al tiu jam neordinara impreso oni almetas tiun cirkonstancon, ke ni estis, rilate al niaj nacioj kaj vivadoj, tute malsimilaj, ke ni kunkomunikiĝis nur per artefarita lingvo ankoraŭ malofte eksperimentata en tiaj kondiĉoj (mi atentigas, ke tiam nenia esperantista kongreso estis okazinta), oni komprenos, ke tiu situacio estis impresiga, kaj lasis al mi fortan kaj neforgeseblan memoraĵon. Ŝajnis al mi ke mi estas transportata en ian sonĝon. Oni pripensu, ke de du semajnoj mi vojaĝis inter indiferentuloj; ke de tri tagoj mi ruliĝis tage kaj nokte inter nekonataj homoj, parolantaj nekonatajn lingvojn; kaj subite mi renkontis ne nur kunparolanton, sed eĉ amikon, kiu akceptis min kiel efektiva frato, kaj klopodis ĉiumaniere, por montri al mi sian serveman fervoron. Ofte nia babilado aludis diversajn rimarkojn de nia trijara korespondado; iafoje, li montris al mi, tra la vagonfenestro, lokon aŭ pejzaĝon, kies nomon mi jam sciis, aŭ kie okazis fakteto jam de mi konita per liaj leteroj. Mi estis kiel homo, kiu, post longa forestado, revidas landon jam kutiman, kaj ĉio, tamen, en tiu lando, estis por miaj okuloj nova kaj fremda!

Ja tiun nekompareblan situacion mi ŝuldis nur al Esperanto. Oni do komprenos, ke mi povas nur ridi, kiam oni diras, ke ĝi ne sufiĉus por efektivaj rilatoj. Kiel ĉiuj homaj kreitaĵoj, ĝi ne estas tute perfekta; oni povus eble iom plibonigi ĝin. Sed mia sessemajna eksperimento montris al mi nerefuteble ke, en ĝia nuna stato, ĝi jam

taŭgas por interrilatigi ĝis plena reciproka pensintimeco kaj frata amikiĝo, du homojn, kiujn ĉio, krom Esperanto, apartigis kaj fremdigis.

Post unuhora veturo, kio estis seninterrompa babilado, ni alvenis en la urbeton Sumi'on, celon de mia dusemajna vojirado, kie mi povis fine halti kaj ripozi! Estis al mi dolĉe ne plu esti devigata batali per gestoj kun la pakaĵportistoj kaj oficistoj de la fervojo. Dank' al mia amiko, mi tuj kaj facile aliris al la pordo de la stacidomo. Tie agrabla surprizo atendis min. Kelkaj junuloj kaj knaboj, kiujn mi konis per la korespondo de s-ro Speranskij kaj al kiuj mi skribis iafoje poŝtkartojn esperante, venis kaj donis al mi afablan kaj fervoran bonakcepton, kisante min, kvazaŭ mi estus malnova amiko. Kaj tra la scideziro de iliaj okuloj, observadantaj la esperantistan fremdulon, mi facile konstatis sinceran simpation, kiu tre kortuŝis min.

Ĉe mia amiko mi trovis tute familian akcepton. Kelkfoje, en tiu rakonto, mi havos okazojn montri la rusan gastemecon, tiom simplan, sinceran kaj malavaran, kiu tuj atentigas la fremdulon. Se vi eniras la dometon de ia malriĉa muĵiko, li povos proponi al vi nur nigran panon kaj iom da lardgrasaĵo kaj kredeble da brando. Sed li noble kaj tutkore ĝin proponos kaj vi ofendus lin grave, se vi nenion akceptus. Ĉe la pli altaj klasoj, tiu antikva tradicio ankaŭ konserviĝis, kaj enhavas ion grandan kaj simplan, tre malsimilan je nia gracie servema gastemeco franca. Ni francoj kutime superŝutas per gratulaĵoj kaj afablaĵoj niajn gastojn; ni insiste proponas la plej bonan parton de ĉio nia al ili, kiel al homoj superaj, por kiuj nenio estus sufiĉe bona. La ruso akceptas sian gaston kiel efektivan hejmulon, sen afektado de ĝentileco, ankaŭ sen ia limiga kondiĉo: ĉio hejme estas reale je lia dispono kiel je tiu de la mastro mem. Tiu farmaniero estas pli senceremonia, sed ŝajnas al mi pli reale gastama.

Mia akcepto ĉe s-ro Speranskij havis tiun karakteron, sed plu, ion intiman kaj ameman, kvazaŭ mi estus efektiva ano de lia familio. Mi neniam forgesos, kun kiu kortuŝiga zorgo lia patrino min flegis, kelkajn tagojn poste, kiam ne atendita kaj tre maloportuna reŭmatismo detenis min en mia ĉambro. Bedaŭrinde s-ino Speranska ne parolis esperante, kaj ni povis interŝanĝi, sen tradukanto, nur malmultajn vortojn ruse aŭ france. Sed l' animboneco ne bezonas lingvan tradukon. S-ino Speranska agis rilate al mi kiel al filo kaj mi estas feliĉa, ke tiu rakonto havigas al mi okazon, por doni al ŝi publikan ateston de mia dankeco.

S-ro Speranskij havas fraton kaj fratinon ambaŭ esperantistojn; sed nur lia fratino estis en Sumi dum mia ĉeestado. En tiu urbeto parolis esperante ankaŭ du aliaj samideanoj s-roj Efremov kaj V. Postalenko (mi skribas *parolis*, ĉar nun, dank' al la fervora propagando de mia amiko, estas en Sumi aro da esperantistoj, kiuj senĉese plimultiĝas kaj kredeble ricevos baldaŭ de la registaro permeson por iĝi oficiale grupo). Cetere, oni ne kredu, ke mi povis havi rilatojn nur kun tiuj kvar esperantistoj. S-ro Speranskij prezentis min al siaj amikoj kaj konatuloj. Kun du el ili mi povis paroli france; kun la

aliaj li estis mia lerta kaj nelacigebla interpretanto, kaj dank' al lia senĉesa pero kaj al la natura afableco de la rusa loĝantaro, mi baldaŭ havis en tiu fremda urbeto multajn amikojn de diversaj klasoj de la societo. Estis antaŭ konsentite kun mia amiko, ke ni vojaĝos kune en Rusujo, kaj, nome; vizitos la malnovan ĉefurbon Moskvon. Sed neatendita maloportunaĵo ne permesis, ke li prenu longan libertempon por forveturi malproksimen ekster Sumi. Tamen ni povis fari oftajn ekskursojn ĉirkaŭ tiu urbeto, ĉar lia ĉiutaga deĵoro estis finanta je la tria horo posttagmeze, kaj li povis disponi multajn liberajn tagojn, ĉe la tribunalo, en kiu li estis oficisto, ĉu laŭ speciala permeso, ĉu pro la festaj tagoj, kiuj estas multegaj en la rusa kalendaro. Rusujo ja meritas esti la paradizo de la mallaboremuloj: ĉio tie estas preteksto por senlaboreco, ne nur la dimanĉoj kaj la multaj festoj ortodoksaj, sed ankaŭ oftaj nereligiaj solenaĵoj kaj datrevenaj nomfestoj de l' caro, de l' caredzino, de l' carfilo, datrevenoj de l' naskiĝo kaj kronado de l' regnestro, k. t. p., tiel ke proksimume unu triono de l' jaro estas senlabora. Mi legis, ke pri tio plendas la bienuloj kaj la instruistoj, kiuj pretendas, ke tiu troeco da ripoztagoj malutilas la terkulturon kaj la klerigon de la lernantaro. Tiu lasta riproĉo ŝajnas al mi neprava, ĉar la rusa gelernantaro neniel estas malsupera je la aliaj, kion mi montros poste, kiam mi donos miajn impresojn pri ĝi. Kio ajn estas, mi mem ŝuldas multan dankecon al la rusa kalendaro, kiu tre faciligis mian ĉeestadon; kaj eĉ nun, kiam ĉiutage mi forŝiras la hieraŭan folion de la efemeridoj, al mi senditaj de mia amiko, ofte mi ekspiras envie, ektrovante ruĝan paĝon, kiu sciigas, ke tiu tago ankoraŭ estas senlabora... nur por miaj feliĉaj ortodoksaj samideanoj!

Sed mi reiru al miaj unuaj impresoj post mia alveturo en Sumi'on.

Imagu vi min, ekzemple, unu horon post mia alveno, sidantan apud la tablo de miaj gastigantoj, en ilia salono, kaj babilantan kvazaŭ familie kun ili. Katja, la malgranda servistineto, eniras senbrue kiel fantometo sur siaj nudaj piedoj. Post respekta saluto kaj duontimema, duonmokema ekrigardo al la fremda gasto, kiu parolas lingvon tiel strangan, ŝi metas sur la tablon barĉon kun viandaĵo, fumantan kaj bonodoran, iom similan je franca bovbolitaĵo, kies belŝajno estas al mi, malsata vojaĝanto, aparte dolĉa kaj promesplena. Sed, antaŭ ol manĝi, mi devas, laŭ la rusa kutimo, toasti kun mia mastro kaj trinkegi per unu fojo glaseton, plenan da vodka. Tiu blanka brando el sekalo estas bongusta kaj, feliĉe, ne forte alkoholumata, ĉar dum mia ĉeestado en Rusujo mi devos trinki multajn similajn glasetojn. Male je niaj okcidentaj kutimoj, la rusoj trinkas brandon antaŭ aŭ dum la manĝado, neniam poste.

Mi tre ŝatas la rusan barĉon, sed post ĝi, kun la sekvantaj pladoj, oni manĝas, anstataŭ salato, kukumojn, moligitajn en ia maldolĉa peklakvo, kiu donas al mia nerusa stomako fortan soifon. Male, miaj gastigantoj ŝajnas tre frandemaj pri tiuj legomoj, kiujn ili miksas kun ĉiuj manĝaĵoj ĝis la deserto. Fine, oni alportas la samovaron aŭ temaŝinon.

Kelkaj el miaj legantinoj kredeble ne scias precize, el kio konsistas la samovaro; mi do priskribos ĝin iom detale, ĉar ĝi estas tre grava elemento kaj kvazaŭ la simbolo de la rusa hejmo, kiel la fajrujo ĉe la okcidentaj popoloj. Ĉar ne fajrejoj, t. e. kamenoj, hejtas la rusajn domojn, sed centra fornego, iom komparebla kun tiuj de niaj bakistoj, konstruita tiel, ke ĉia ĉambro povu hejtiĝi per ĝia kontakto. Sekve, dum la vintra malvarmego, ne apud kameno, kiel ĉe ni, la rusaj familioj sidas por pasigi la longajn vesperojn, sed ĉirkaŭ la samovaro, staranta sur la tablo kaj aldonanta sian kutiman murmureton al la paroladoj de la familia rondo, kiel la grilo de niaj kamenoj.

Samovaro estas kupra vazego, kun piedo, havanta du tenilojn, supran mallarĝan faŭkon kaj malsupran kranon. Ĝin trairas, laŭ ĝia tuta alteco, centra tubo, dividata je du partoj per krado. Sur la supran faŭkon, kie estas la ekstremaĵo de tiu interna tubo, oni povas almeti laŭvole ĉu ferladan kamentubeton, ĉu kupran piedestaleton kaj kovrilon. Verŝinte akvon en la samovaron, oni ŝutas en la centran tubon, sur la kradon, karberojn, kiujn oni ekbruligas per aertirado kun la helpo de l' ferlada kamentubeto. Kiam la karbo brulas kaj kiam ekronkas la akvo, verŝita ĉirkaŭe en la samovaro, oni anstataŭigas la kamentubeton per la piedestaleto kaj oni alportas la samovaron antaŭ la mastrino, sur pletegon, kie jam orde estas teskatolo, tekruĉeto, sukerujo, telertuko, glasoj, teleroj, kuleretoj kaj konfitaĵoj.

Kompreneble, ne nia eta Katja povas alporti tiun multepezan ilaregon, sed ŝia kuiristina moŝto Ksenja mem solene plenumas tiun gravan oficon.

De tiam komenciĝas la rolo de la rusa domestrino, per kiu sin montras plej plene ŝiaj mastraj lerteco kaj afableco. Ŝi verŝas per la krano de la samovaro iom da bolanta akvo en la tekruĉeton por varmigi ĝin, forĵetas tiun akvon en la lavtason, ŝovas teon en la varmigitan tekruĉeton, alverŝas bolantan akvon, metas la tekruĉeton sur la piedestalon super la centra tubo, kaj plie kovras ĝin per la telertuko por ke la infuzo estu pli perfekta. Iom poste estas en la tekruĉeto teo malhela kaj tre forta. La mastrino verŝas iom da ĝi en la glasojn kaj almetas pli malpli da bolanta akvo por ĝin malfortigi, laŭ la deziro de siaj gastoj. Samtempe, ŝi proponas, sur la teleretojn, konfitaĵojn, kiujn oni gustumas per malgrandaj pecetoj kune kun plenkuleretoj da teo. Tuj kiam unu glaso da teo estas malplena, la mastrino afable proponas alian, lavas la glason per iom da bolanta akvo, kiun ŝi forĵetas en la lavtason, kaj ree verŝas novan plenglason. Tiel glaso post glaso, oni trinkas iafoje dum horoj, babilante kaj fumante bonodorajn cigaredojn de flavruĝa tabako. Kaj estas interese vidi la mastrinon partopreni en la parolado, atenta por diri afablan vorton al ĉiuj, dum ŝi lerte manovras la malsimplan ilaron de sia samovaro, jen turnante la kranon aŭ lavante glason, jen proponante ree konfitaĵojn aŭ farante freŝan teon, kiun akvumas senlace la ronkanta samovaro.

Se vi pripensos, ke la rusaj urboj ne havas ĝenerale kafejojn aŭ publikajn kunsidejojn, kie la viroj povu paroli pri siaj aferoj, sekve ke ili devas renkonti unu la alian ĉu en siaj oficejoj, ĉu, kiel la virinoj, ĉe siaj hejmoj, vi tuj komprenos, ke en la salonoj de la meza klaso estas tre oftaj vizitoj kaj ke la samovaro funkciadas preskaŭ dum la tuta tago.

Eble ankaŭ pro tio, la viroj, devigataj trakti seriozajn temojn antaŭ la virinoj, kutimis rilati kun ili iom alie ol ni francoj. Ĝenerale la virina klereco ne estas, en Francujo, tiel forta, kiel tiu de l' viroj: almenaŭ ĝi celas pli vole la sciojn ornamajn kaj agrabligajn, kiel la muzikon, la pentrarton, k. t. p., taŭgajn por reliefigi la naturan allogecon de la bela sekso. Antaŭ ĉio la franca virino deziras plaĉi, kaj la monduma bonmaniereco konsistas, por ŝi: aperi kiel eble plej gracia; por la viro: montri sin kiel eble plej allogata de tiu virina gracieco. Eĉ inter gepersonoj parolantaj serioze, tiu ambaŭa priokupado estas iom sentebla. Inter gehomoj rusaj, ĝi estas malofta. Viro bone edukita parolas al virino respekte kaj ĝentile, sed kun neflatema seriozeco. Li ne timas trakti gravajn demandojn kaj siaflanke la virino respondas sen malvera honto kaj embaraso. En tio la rusa virino gajnas per vera indeco, kion ŝi perdas per ŝajna flatiteco. Se ni, francoj, bonvolas ekzameni sincere nian sintenadon aminduman kaj spriteman antaŭ la virinaro, ni devas konfesi, ke sub ĝia afableca sed trompeca mantelo, ĝi efektive kovras ian fundeton de vira malhumileco kaj de praava nepoluriteco rilate al estaĵoj, kiujn ni certe tre amas, sed konsideras, pli malpli konscie, kiel malsimilajn kaj eĉ iom malsuperajn. Kontraŭe ĉe la mezaj kaj superaj rusaj klasoj, la egaleco de l' rajtoj kaj saĝaj kapabloj inter la ambaŭ seksoj ŝajnas esti akceptataj de la moroj, kaj por tio Rusujo ŝajnas al mi eksperimentejo antaŭdestinata por la "Feminismo". Jam ne estas alia lando, kie la studentinoj estas tiel multaj. La ŝtataj administracioj jam uzas virinojn kaj—detaleto tre rusa—donas al ili uniformojn kaj galonojn! Virinoj ne timas sekvi la virojn sur la plej danĝerajn vojojn, kaj, antaŭ tridek jaroj la nihilismo, nun la revoluciismo, fiere montras virinojn kaj fraŭlinojn en siaj martiraroj.

Mi memoras pri tio, ke mi vidis kuriozan kaj signifan bildon disvastigatan en Rusujo dum la komenco de 1905. Ĝi prezentis junan virinon, fiere starantan, kiu streĉas sian brakon al alia virino, kondamnita je morto kaj pendigita. Sur la trabo de la pendigilo oni legas: "Pro kaŭzo de politikaj opinioj", kaj sube: "Politika proceso de 1881; ekzekuto de Sofja Perovska". Kaj la juna virino diras tiujn parolojn: "Se virino estas inda iri sur eŝafodon, ŝi ankaŭ estas inda iri en Parlamenton". En lando, kie la politikaj postuloj ne estas sendanĝeraj, se oni povas malaprobi, oni ne povas moki tian pretendon, kaj pro tio la rusa "suffragette" (balotemulino) ne estos ŝercata kiel iafoje ŝiaj fratinoj angla aŭ franca. Sed tiu liberaleco de la rusaj virinoj estas tiom pli kurioza, ke ĝi estas tute kontraŭa je la moroj de iliaj praavinoj. Antaŭ Petro Granda Moskovujo estis ricevinta, pro siaj rilatoj kun Bizantujo, morojn tre similajn je tiuj de

la nuntempaj islamanoj. La virino estis ŝlosata en la "terem" kiel nun islamanino en sia "harem"; kiel ŝi ankaŭ, ŝi estis neniam sendependa, submetite unue je sia patro, due je sia edzo, antaŭ kiu ŝi estis nur egalrajtulino de siaj propraj infanoj. Dum la edziĝa festo, la patro donis al sia bofilo skurĝon, per kiu tiu ĉi tuŝetis sian novan edzinon, kaj tio estis simbolo tre signifa, ĉar la *Domostroj* aŭ Mastrumo, verkita de pastro Silvestro, instruisto de l' caro Ivano Minaca, donas ja la sekvantajn konsilojn: "Se la edzino, la filo aŭ la filino ne atentas la parolojn kaj konsilojn de l' familiestro, ne aŭskultas kaj timas lin, se ili ne obeas la ordonojn de la edzo, patro aŭ patrino, oni devas skurĝi ilin sekrete, kaj ne antaŭ la servistoj, kaj instruinte ilin, pardoni, ĉio sen kolero de iu ajn. Kaj, pro ia ajn kulpo, oni ne devas bati sur orelon aŭ sur la vizaĝon, nek per la pugno sur la bruston, nek per piedo aŭ bastono, nek per ilo fera aŭ ligna. Se iu, pro sia kolero aŭ malkontento, tiel frapas, el tio devenas gravaj malbonaĵoj—blindeco, surdeco, elartikiĝo de kruroj, brakoj aŭ fingroj, kap- aŭ dentdoloroj, kaj iafoje infanoj estas vundataj en la ventro patrina. Vi devas, por puni, frapi per skurĝo—tio estas prudenta, kaj tio doloras, tio estas timinda kaj favora por la saneco. Se estis ia grava kulpo, malobeo, nezorgo, oni devas sublevi la veston, teni la kulpulon per siaj manoj kaj skurĝi proporcie je la kulpo, kaj, skurĝinte, aldiri kelkajn bonajn parolojn".

Tiuj antikvaj kutimoj, hodiaŭ tute malaperis, almenaŭ ĉe la mezaj kaj superaj klasoj, kie la edzino ne estas plu servistino timigata kaj enmonaĥejigata, sed vere egalulino de sia edzo.

Nun mi ekrimarkas, ke la fumo de mia unua samovaro, kiel la karbonika acido de l' ĉampanvino, stimulis mian cerbon kaj forlogis min malproksimen en la estinton. Mi do revenas al la estanto kaj al mia rakonto.

Kiam mi estis fininta mian unuan manĝadon ĉe miaj gastigantoj, mi foriris kun s-ro Speranskij por fari mian unuan promenon en Sumi. Estis iom malfrue; la oficejoj estis fermintaj siajn pordojn kaj iliaj posedantoj nun paŝadis en la precipa strato por ĝui la vesperan freŝecon post varmega tago. Ĝenerale Rusujo estas fama kiel tipo de lando malvarmega, kaj oni ĝin imagas nepre kun neĝo, glitveturiloj kaj lupoj; oni ne pripensas ke, kiel regiono preskaŭ senmara, ĝi havas malmoderan klimaton, malvarmegan vintre, sed tre varman somere. Dum mia ĉeestado, t. e. de l' komenco de julio ĝis la mezo de aŭgusto (de la okcidenta jarstilo) la hidrarga nivelo de la termometro Réaumur, uzata en Rusujo, neniam estis malsupre de 24 gradoj (30 gradoj de la centigrada termometro). Sed ofte, dum la tago, estis mallongaj pluvetoj, kiuj malvarmetigis la veteron, kaj superverŝis la verdan foliaron; plie facila venteto, la venteto de l' stepoj, igis tre tolerebla tiun temperaturon.

Cetere, en tiu urbeto, malspritaj modoj ne devigis la loĝantojn sin vesti per rigidaj ĉemizoj kaj amelumitaj kolumoj. Plej ofte, la supra vesto de l' viroj konsistis el

"rubaŝka", maldika ĉemizeto kun larĝaj manikoj, butonumebla ĉe la maldekstra ŝultro, kaj premata ĉirkaŭ la talio per leda, lana aŭ eĉ silka, zono. Tiuj ĉemizoj estis diverse kaj hele koloritaj ruĝe, blue, flave, viole. Kelkaj estis lukse broditaj, ĉefe tiuj de junaj studentoj, kiuj dandis iomete antaŭ la sumianaj belulinoj. Ĉi tiuj, ankaŭ, ŝatis la vestojn diverskolorajn. Kompreneble, en tiu rusa promenularo, superis la neeviteblaj uniformoj, blankaj aŭ grizaj, kun ruĝaj galonoj ĉe la oficiroj, kadetoj kaj soldatoj; kaj ĉiuj, soldatoj, gimnazianoj, oficiroj, oficistoj aŭ eĉ komercistoj kaj privataj homoj sen uniformo, havis "furaĵka'on" aŭ rusan ŝirmilĉapon, mi sola, preskaŭ skandale, min apartigis kaj neeviteble elmontris al ĉiuj mian fremdulecon per mia pajla ĉapelo!

Ni sidiĝis sur benkon de la urba ĝardeno. S-ro Speranskij montris al mi kiel oni povas, per la vestaroj, distingi ne nur la socian situacion de la rusoj, sed eĉ la administracian rangon de la civilaj oficistoj, ĉar nenia alia nacio estas tiel oficiale hierarĥiigita. Ĉiu rusa homo, havanta oficon de la ŝtato, ĉu militan, ĉu maristan, ĉu eklezian, ĉu administracian, apartenas al la dekkvarklasa hierarĥio "ĉin", kreita de la caro Petro Granda.

Per la sekvanta tabelo mi provas klarigi, el kio konsistas nun tiu hierarĥio.

RANGOJ.

N-o de la rangoj.	administraciaj.	militistaj.	maristaj.	ekleziaj.
14-a	kolegia registratoro	—	—	—
13-a	—	korneto.	—	—
12-a	sekretario de gubernio	subleŭtenanto	miĉman	—
11-a	—	—	—	—
10-a	kolegia sekretario	leŭtenanto	—	—
9-a	titola konsilisto	ŝtabrotĉefo	leŭtenanto	diakono
8-a	kolegia asesoro	rotĉefo	—	protodiakono

7-a	korta konsilisto	subkolonelo	ŝipestro de 2-a rango	pastro
6-a	kolegia konsilisto	kolonelo	ŝipestro de 1-a rango	protopastro
5-a	ŝtata konsilisto	—	—	igumeno (monaĥejestro)
4-a	efektiva ŝtata konsilisto	general-majoro	kontradmiralo	arĥimandrito
3-a	sekreta konsilisto	general-leŭtenanto	vicadmiralo	episkopo
2-a	efektiva sekreta konsilisto	generalo	admiralo	arĥiepiskopo
1-a	regna kanceliero	general-feldmarŝalo	general-admiralo	metropolito

La administraciaj titoloj estas nur honorigoj kaj sen rilato kun la efektiva funkcio de la oficistoj; ili nur montras ilian socian rangon kompare kun tiu de la oficiroj kaj ekleziuloj. Oni vidas, ekzemple, ke la administracia oficisto, havanta la rangon de sekretario de gubernio estas egalranga kun militisto subleŭtenanto kaj marista miĉmano, ke administracia korta konsilisto havas la rangon de subkolonelo, de ŝipestro de dua rango kaj la pastro.

Iam la enviciĝo en la "ĉin" havis gravan rezultaton, ĉar nur la "ĉinovniki" (ĉinranguloj) estis homoj liberaj kaj ne submeteblaj je la korpaj punoj. Nun ĝi iom post iom iĝas nur honora apartigo, kaj la administraciaj rangoj estas iafoje donataj, kiel niaj ordenoj, al neoficisto, kiel scienculo, verkisto, kuracisto, aktoro. Kun la ĉin'aj rangoj korespondas specialaj moŝtaj titoloj, uzataj en la oficialaj rilatoj kaj en la korespondado. La ĉinovniki de la 14-a ĝis la 9-a rango havas la moŝtan titolon "via blagorodie" (via nobeleca moŝto), la 8-a ĝis la 5-a, oni titolas ilin "visokoblagorodie" (via altanobleca moŝto), en la 4-a ili iĝas "prevosĥoditelstvo" (via ekscelenca moŝto), fine, kiam ili altiĝas ĝis la dua kaj unua rangoj, oni respekte balbutas antaŭ ili "vaŝe visokoprevosĥoditelstvo" (via altekscelenca moŝto).

Tiel la administracia burokrataro estas speciala nobelaro, starigita apud la naskiĝa nobelaro. Tiu sistemo donas al ĝi grandan brilon kaj forton apud la simplaj homoj, sed ĝi iĝas pli kaj pli arkaika kaj strange kontrastas kun diversaj tre liberalaj trajtoj de la rusaj moroj.

Ekzemple, speciale altiris mian atenton la sendependa sintenado de la fraŭlinoj kaj fraŭlinetoj, kiuj libere promenis ope kaj kun junuloj. Mi rimarkigis tion al mia gvidanto kaj mi konstatis, per lia respondo, ke la kutimoj de la aŭtokrata Rusujo, rilate al la fraŭlinaro, estas pli liberemaj, ol tiuj de nia respublika Francujo. La junulinoj ĝuas, kiel en Anglujo kaj Skandujo, tre grandan liberecon, kaj vivadas en facila kaj deca intimeco kun la junuloj. Tion kredeble ebligas la rusa sistemo de edukado: en la lernejoj la edukatoj povas vivadi kiel internuloj, sed tio estas pli malofta ol ĉe ni, kaj se iliaj gepatroj ne loĝas en la sama urbo, ili prefere donas siajn gefilojn al la gardo de familioj, por ke ili povu lerni kiel eksteruloj kaj ĝuadi vivadon hejman kaj pli liberan. Sed, eĉ la edukatoj, kiuj loĝas en la lernejo mem, havas iom da libereco kaj povas foriri por viziti siajn konatulojn. Cetere, en la lernejo okazas iafoje festoj kun festenetoj, teatraj kaj dancadaj kunvenetoj, en kiuj partoprenas la gelernantaro de la aliaj lernejoj. Ĉu dank' al tiu sistemo de edukado, ĉu dank' al la karaktero mem de la rusoj, kiu igas ĝin ebla, inter geknaboj kaj gejunuletoj estas facilaj kaj afablaj rilatoj, kiuj kontrastas kun la iafoje ĉu embarasata, ĉu tro malĝena sintenado de niaj gefrancetoj.

Cetere la karaktero mem de la rusaj knaboj meritas specialan priskribon. Ni, francoj, agas kun niaj filetoj, kiel kun estaĵoj de aparta speco. Ni vestas ilin, kiel eble plej longatempe per graciaj kaj fantaziaj kostumoj, specialaj por ili. Ankaŭ la karaktero de niaj paroladoj al ili estas speciala. Se ni renkontas la dekdujaran filon de konatulo, tuj ni prenas ridetan mienon, ni penas nin "etigi" por egaliĝi kun tiu hometo, kiu responde afektas infanan rideton, afablan, sed tute malsinceran kaj malsimilan je lia kutima sintenado, kiam li parolas libere kun samaĝulo. Tio estas nenatura, ĉar la instinkto de la knabo instigas lin altiĝi kiel eble plej multe ĝis la homoj pli maljunaj ol li.

Kontraŭe, la kvazaŭ soldata rusa disciplino kaptas la knabon en sian rigidan modelilon kaj apenaŭ dekjaran, lin vestas per la uniformo, kiu lin tenos ĝis lia morto. Ĉiu rusa lernanteto devas senĉese porti la lernejan uniformon, kaj tiu uniformo estas ne knaba, sed plenaĝula vesto. Eĉ se li ne iras en lernejon, la knabo sin vestas kiel viro, kaj ĉiu ajn dekjara ruseto estus tre honta havi mallongan pantaloneton. Kompreneble, li estas neserioza, bruema, amuzema, unuvorte knabo, sed, eĉ kiam li petolas, li konservas specialan indecon, pliĝustadire viran ol knaban. Kaj kun li, la plenaĝaj rusoj ordinare parolas serioze, klopodante lin altigi ĝis si mem, plivole ol sin egaligi kun li. Mi estis tre surprizata konstati, ke rusaj dekdujaraj knaboj jam legas kaj ŝatas verkojn kiel "Mortintaj animoj" de Gogol, "Reviviĝo" de Tolstoj, kaj rusajn tradukojn de l' verkoj de V. Hugo kaj eĉ de Zola. La Rusoj ne timas doni al tiuj junaj cerboj plenan

intelektan nutraĵon. Kion valoras tiu sistemo de edukado? Ĝi certe produktas junuletojn pli seriozajn, pli klerajn kaj eble pli simpatiindajn, ĉar kun tiuj bonaj ecoj ili plej ofte restas modestaj. Sed, bedaŭrinde oni ne povas doni al ili samtempe, kiel mezurilon kaj necesan direktilon, la spertecon, kiu rezultas nur el la vivado; tial, iafoje, tiuj knaboj, iĝinte junuloj, atentas nur la allogecon de l' teorioj, kaj forgesas, ke ĉiam, en ĉiu homa societo, praktikan kaj daŭradan rezultaton oni povas atingi nur per pogradaj kaj metodaj antaŭenpaŝoj.

Dum mi tiel prenis unuan ekvidon de la rusa popolo kaj interŝanĝis rimarkojn pri ĝi kun mia kunparolanto, la suno estis tute malaperinta kaj nun elektraj lumigiloj ekbrilis ĉirkaŭ mi. Malrapide ni returneniris dum la promenantoj iom post iom malproksimiĝis, ĉar la loĝantaro de Sumi ne estas noktovagema. En la silentiĝintaj stratoj oni aŭdis nur la klakilon de l' noktgardisto, kiu, per tiu brueto kompleze antaŭinformis pri sia alveno iliajn ŝtelistajn moŝtojn. Sub la centra kupolo de la preĝejoj staris senmove la malhelaj siluetoj de l' fajrogardistoj, observadantaj la dormantan urbon, pretaj por signali la bruladojn, oftajn kaj danĝerajn ĉe la malgrandarusaj konstruaĵoj, kie la ŝtono, tre nekomuna, estas ĝenerale anstataŭata per lignaĵo.

Senbrue ni reiris hejmen, kaj mia amiko kondukis min, lacegan korpe kaj spirite, al mia nokta ĉambro. Jam de tri noktoj mi ne estis kuŝiĝinta sur reala lito! Mi do ekrigardis kun antaŭa danko tiun ĉarman meblon, plejbonan amikon de ĉiu laca vojaĝanto, kaj... mi restis iom surprizata.

Antaŭ mi estis malalta ferlito, kun matraceto kaj unu littuko, sur kies mezo kuŝis faldita kovrilo kaj kapkuseno. Kredeble, mia mieno montris mian internan embarason, ĉar s-ro Speranskij ne povis deteni sian ridon, kiam mi demandis, kiel mi devas uzi tiun liton. Tiam, mi eksciis, ke la rusoj, por dormi, ne senvestigas sin tiel plene kiel ni, sed formetas nur siajn superajn vestojn, sin envolvas per la kovrilo, sterniĝas sur la liton kaj ekdormas.

Mi do tiel faris, kaj ricevinte la noktajn bondezirojn de mia amiko, kiu tiris antaŭ mia duobla vitrafenestro la dikan lankurtenon, anstataŭantan niajn lignajn fenestrokovrilojn, mi baldaŭ forrapidis en novan landon ankoraŭ pli malproksiman ol Rusujo—en Sonĝolandon.

III.

La postan tagon, je mia vekiĝo, mia gastiganto proponis, ke ni iru nin bani en la Psjol'on. Mi plezure akceptis, ĉar la vetero estis tre varma. La rusoj tre ofte sin banas, heredinte, kiel la turkoj, tiun ŝatemon de la Bizantoj. Mi devas aldiri, ke tiu higiena

kutimo, bonega ĉie, estas speciale necesa por la popola klaso de Rusujo, precipe ĉe la grandarusoj, kiuj ne sufiĉe zorgas pri la detaloj de la ĉiutaga tualeto, kaj estus, sen tiuj oftaj banoj, terure malpuraj.

Dum la vintro, ne estas eble sin bani en la frostiĝintaj riveroj, sed en Rusujo, kiel en Turkujo kaj Norda Afriko estas specialaj ŝvitbanejoj, iom similaj je la romaj "thermoj". Tiuj rusaj ŝvitbanejoj estas tre diversaj, de la luksaj marmoraj banejoj en la urbegoj, ĝis la humilaj lignaj banejoj vilaĝaj. Sed, principe, ĉiuj konsistas el tri ĉambroj—la senvestiĝejo, la laviĝejo, kun akvoj varma kaj malvarma, kaj la ŝvitejo. En tiu lasta ĉambro staras fornego kun fera varmega platego, sur kiun oni verŝas intertempe akvon, kiu tuj vaporiĝas kaj plenigas la aeron per malseka kaj varmega nebulo. Ĉirkaŭe en la ĉambro kuŝas kelkaj longaj bretoj el ligno, amfiteatre surmetitaj, sur kiujn sin sternas la banantoj. Ju pli alta estas la breto, des pli varma kaj sufokiga la atmosfero estas. Kaj multaj rusoj preferas la plej altajn lokojn, kie ili ŝvitas ĝis tuta malfortiĝeco, kaj, plie, sin vergigas per vergofaskoj, kuiritaj en bolanta akvo! Iafoje, iaj bravuloj,—plej ofte de la klaso de komercistoj, kiuj estas efektivaj forteguloj,—post ŝvitego kaj vergado, ruĝaj kiel kuiritaj omaroj, kuras eksteren kaj rulas sian nudan kaj varmegan korpon en la neĝo, kriegante kaj ridegante pro volupteco sub la malvarmegaj kisoj de la frostego; poste tiuj herouloj ree kuras en la ŝvitejon kaj saltas sur la plejvarman breton! Sed tio estas danĝerega plezuro, ebla nur por homoj, havantaj bovan farton. Ĝenerale, la rusoj, post ŝvitado kaj vergado, nur lavas en la dua ĉambro sian korpon, moligitan per la vaporo, kaj fine sin malvarmetigas per malpli varma akvo.

Feliĉe, dank' al la somero, mi ne estis suferonta tiun timindan rusan operacion, sed nur banonta, kiel mi jam diris, en la malvarmetajn akvojn de la Psjol.

En tiu ebena lando, sen ŝtonoj kaj preskaŭ sen arboj, povantaj deteni la teraĵon, la riveroj havas tre kaprican kaj ŝanĝeman direkton. Dum la printempo, kiam la degelado multobligas iliajn akvojn, ili disfluas super siaj malaltaj bordoj kaj superakvigas la ĉirkaŭaĵon. Por fiksi la fluejon de la Psjol en Sumi, oni donis al ĝi bordojn, artefaritajn el palisaroj, apogitaj kontraŭ teraj deklivaĵoj. Tamen, en kelkaj lokoj de la urbo, oni lasis ĝin disflui sur nedeklivajn sablobordojn, kien la urbanoj venas amase sin bani.

Tiun matenon, do, kun mia gastiganto, mi iris en unu el tiuj banlokoj apud la pola preĝejo, kaj tie mi vidis ne atenditan spektaklon. Antaŭ mi, aperis aro da plenaĝaj viroj, da junuloj kaj knaboj tute nudaj, ĉu starantaj aŭ sidantaj sur la bordo, ĉu naĝantaj aŭ petole saltantaj en la rivero, kvazaŭ ili tute ne rimarkus sian "paradizan" kostumon! Apenaŭ kelkaj el ili forirante el la akvo, duone ekimitis la honteman geston de la Venuso de Mediĉi!

En Polinezio tia senĉemizularo ne estus min miriginta, sed en Rusujo mi ĝin ne atendis! Kredeble, mia amiko, kiu jam komenciĝis senvestiĝi, rimarkis ion neordinaran en mia mieno, ĉar li diris al mi demande:

—Nu! Ĉu vi ne deziras plu vin lavi?

—Mi deziras, sed mi devas konfesi, ke mi estas iom... mirigata. Ĉu, do, la Rusoj kutimas sin bani en tia vere simpla... senvesto?

—Kio? Ĉu vi mem kutimis konservi viajn vestojn dum la bano? Ha, mi divenas! Eble vi dezirus unu el tiuj trikotaj banvestoj, kiujn mi vidis en kelkaj mondumaj banlokoj sur la bordo de la Nigra maro? Se nur mi estus ĝin antaŭsupozinta, mi estus provinta trovi unu en Sumi... kvankam mi devas diri al vi, ke tio ŝajnus tie tre stranga kaj altirus sur vin la atenton de ĉiuj. Entute, nenio tie estas malbona kaj nenatura.

—Ho certe, mi konsentis, ĉio estas, kontraŭe, tre laŭnatura!

—Rimarku, li aldiris, ke vi estas inter homoj tre decaj. Rigardu, ekzemple, kaj li montris kun duonrideto diketan kaj solenan viron, kiu plaŭdis en la akvo kun du knaboj, dum severmiena soldato rigide staris apud iliaj vestoj, metitaj sur tapiŝeto, tiuj sinjoroj ne estas malpli ol lia "ekscelenca" moŝto generalo de nia urbo kaj liaj filoj!

Tiu vere rusa argumento tuj konvinkis min. Cetere la reala konveneco, en tiaj cirkonstancoj, estis konduti kiel ĉiuj kaj ne altiri la atenton sur aĵojn, pri kiuj neniu pensis.

Tamen, iom poste, dum mi naĝis apud mia amiko, mi demandis ŝerceme:

—Kaj ŝia "ekscelenca moŝtino" generaledzino, ĉu ankaŭ ŝi tiel same sin banas?

—Certe, sed, kiel ĉiuj sinjorinoj de la altaj kaj mezaj klasoj, ŝi banas sin en fermita loko. Tamen, iom pli malproksime, estas parto de la rivero, kie sin banas la virinoj de rango pli modesta. Vi vidos ilin, hodiaŭ posttagmeze, kiam ni faros ŝipetan promenon.

Do, post la tagmanĝado, kiu en Rusujo okazas je la tria horo, ni faris nian preparadon kaj provizadon por ekskurseti per boato al unu el la multaj insuletoj, kuŝantaj inter la fluejoj de la Psjol. Kompreneble, ni ne forgesis forporti kun ni la necesan samovaron, kun karbo por ĝin varmigi. Kun ni venis afabla kaj gaja fraŭlino, amikino de la familio Speranskij, kaj tri knaboj aŭ junuletoj, fervoraj akompanantoj de mia amiko dum liaj boataj promenoj. Nia blanka ŝipeto portis nigre pentritan la francan nomon *Alger*, laŭ delikata afablaĵo por ĝia alĝerana gasto.

Sub la vigla puŝado de nia juna remistaro, ni senbrue glitis kontraŭ la fluo, laŭlonge de la multaj kurbiĝoj de la Psjol. Tie, la rivero estis neprofunda kaj ofte ĝian trankvilan fluadon malrapidigis nenufaroj kaj aliaj akvaj herboj, tra kiuj naĝis kaj plaŭdis aroj de bruemaj anasoj, kiuj disflugis antaŭ nia ŝipeto.

Post mallonga veturado, ni alvenis en lokon, kie sin banis amaso da virinoj, junulinoj, knabinoj kaj knabetoj ĝojaj kaj babilemaj; ĉiuj havis la tre simplan rusan bankostumon, kiun mi jam priskribis. Nia alveno ne ĝenis ilin. Dum ni trapasis, niaj ŝipanetoj ŝerce alparolis tri knabinojn apude ludantajn. Responde, tiuj slavaj nimfetoj fortike naĝis post nia boato, plaŭdante kun ridegoj, kaj ŝprucigante nin per pluveto de perlaj gutoj.

Tio estis kvazaŭ mitologia sceneto, inda je la peniko de artisto, kaj ĉar mi ne estas pentristo mi povis nur fari fotografan kliŝon de tiu gracia pejzaĝo.

Iom poste ni veturis preter la lastaj dometoj de la posturbo, kaj mezen de la kamparo. Baldaŭ, proksimiĝanta bruo altiris nian atenton. Sur vojeto, zigzage disvolviĝanta tra la verda stepo, alkuris galope bando de junaj nudaj rajdistoj. Per siaj kriegoj, ili incitis siajn ĉevalojn, sur kiuj ili sidis firme kaj gracie, kiel indaj idoj de la antikvaj kozakoj de Ukrajno. Ĉiuj homoj kaj ĉevaloj, sin ĵetis maltime en la Psjol'on, farante post si ŝaŭmantan disondaron. Ŝajnis, ke mi vidas aron de nordamerikaj Indioj, rapidantaj, tra rivero, sur la milita vojo.

Sed mi rimarkas ke, jam de kelka tempo, mia okcidenta legantino maltrankvile pensas pri nia juna akompanantino kaj sin demandas: "Kiel, konvena fraŭlino konsentis promeni en lokoj, kie ŝi riskis renkonti tian spektaklon?"

Mi petegas, ke ŝi bonvolu iom atendi antaŭ ol severe juĝi sian slavan fratinon. Certe, mi opinias kun ŝi, ke la korphontemeco estas la plej bela ornamaĵo de niaj okcidentaj virinoj, kaj ĝi estas necesa kondiĉo de la bonordeco de nia societo. Sed, ĉu ĝi estas tiom necesa por ia ajn nacio, per aliaj vortoj, ĉu ĝi devenas de natura kaj tutmonda instinkto, aŭ de loka sistemo de edukado?

Mi loĝas en lando, kie tuta kategorio de virinoj, la islamaninoj, opinias, ke la korphontemeco devigas ilin kaŝi sian vizaĝon antaŭ neparencaj viroj. Tiu sento estas tiom forta, ke eĉ la strataj malĉastulinoj ne konsentus sin montri publike sen vualo. Iu el miaj amikoj, iafoje alvenis neatendite apud izola rivereto, en kiu ĉerpis akvon Maŭrino, vestata per sola robo kaj demetinta sian vualon. Tiu simplulino estis tiel honta montri sian vizaĝon al nekonatulo, ke ŝi preferis por ĝin kovri, levi super sia kapo sian jupon!

Certe al tiuj virinoj la hontemo pri la vizaĝo ŝajnas esti tute instinkta kaj natura. Ĉu, do, ni devas konkludi, ke ne estas konvenaj la eŭropanaj sinjorinoj, kiuj iras eksterhejmen sen kapvualo? Plie, tiuj samaj sinjorinoj, kiuj hontus malkovri en la strato siajn ŝultrojn kaj krurojn, ne timas ilin montri nudajn en balo aŭ banloko. Oni do devas akcepti, ke la korphontemeco estas malsimila laŭ la popoloj, kaj eĉ, ĉe unu sama persono, laŭ cirkonstancoj difinitaj nur de monduma interkonsento. Efektive ĝi estas la rezultato de la edukado kaj de lokaj kutimoj. La nudeco, principe, ne estas malvirto, sed iĝas tia nur, kiam ĝi kaŭzas skandalon kaj hontindan animstaton. En Rusujo, kiel en Francujo, estus hontinde promeni sen vesto sur la stratoj, sed la moroj permesas, ke oni sin banu nude, kaj tio neniun ofendas. Tio, do, ne estas tie malkonvena kaj pruvas nur, ke la rusa animo estas pli simpla kaj pli naiva ol la nia.

La vespermanĝo estis tre ĝoja. Ni albordiĝis en verdan insuleton, ombratan de arboj, kaj nomitan de la Sumi'anoj insulo de Amo, kredeble ĉar ĝiaj densaj foliaroj igas ĝin taŭga nesteto por la kampŝatantaj amantuloj. Sur herban tapiŝon ni metis nian manĝaĵaron, kiun atakis fervore niaj ŝipanetoj kun apetito de dektrijaruloj, duobligata de longa remado.

La rivero mem liveris al ili la akvon necesan por la teo. En la internan tubon de la samovaro ili ŝutis nian provizeton da karbo kun, por ekbruligi ĝin, kelkaj branĉoj, ĉirkaŭe kolektitaj. Bedaŭrinde, ĉu pro la nesperteco de niaj kuiristetoj, ĉu pro la nesufiĉa sekeco de la ligneretoj, nia samovaro ne konsentis ekbruliĝi! La afero ja estis grava: ĉiuj, kun konsternata mieno pripensis, ke ili estos devigataj fari manĝadon sen teo, kio estas abomenaĵo por ĉiu vera ruso... En tiuj malfeliĉaj cirkonstancoj mia amiko ekhavis genian eltrovaĵon kaj uzis artifikon, ŝatatan de la muĵikoj, kiuj ne posedas kuirejan blovilon. Li nur demetis unu el siaj botoj, ĝin starigis renversitan kontraŭ la supro de la samovaro kaj ĝin tenis per unu mano, tiamaniere, ke ĝi fermu la internan kamentubon. Poste, per la alia mano, li vice levis kaj mallevis la tibiingon de l' boto, kiel prenilon de akordiono. Tiu simpla piedvesto, tiel ŝanĝata je blovilo, perfekte plenumis sian novan oficon kaj baldaŭ nia samovaro komencis sian kanteton, karan al la oreloj de ĉiu soifanta ruso.

Jam eknoktiĝis, kiam ni returneniris. Mi bezonus la plumon de Gogol por priskribi la silentan kaj kvietigan majestecon de tiu ukrajna nokto. Ĉiu lando havas sian propran fizionomion kaj ĝia personeco pli intense sin montras dum la nokto. Kiel virino, kiu, dum ŝi dormadas, ŝajnas ellasi sian intimecon, tiel same la Naturo, dum la nokta ripozado, sin liveras pli plene. La rusa steparo tiam estas strange impresiga. Nenio, krom oceano, donas tiel fortan impreson de la Senfineco, kiel senlima ebenaĵo sub ĉielo, plena da steloj. Inter ili, iranta la homo vagas kiel punkto inter du senfinaĵoj. Tiun vesperon, la luno duonheligis per ŝtalblua lumeto la stepon, kie nigraj poploj, tie ĉi kaj tie starantaj, faris nigrajn strekojn kontraŭ la diamanta ĉielo. Arĝenta rebrilaĵo

sur la trankvila akvo de la Psjol apenaŭ sulkiĝis post nia ŝipeto laŭ flue flosanta. Nenia sono, krom, intertempe, bleko de noktabirdo kaj la ritma plaŭdeto de niaj remiloj.

Duonvoĉe mia amiko pentradis al mi la pasintaĵon de tiu lando, dum la epopeaj tempoj de la kozaka Sjeĉ. Ukrajno sidis sur la rando de l' kristana kaj islama mondoj. Tie, nenia barilo povas haltigi homojn, krom aliaj homoj. Al la praavoj de la nunaj malgrandarusoj, al la batalemaj kozakoj komisiiĝis la danĝera tasko defendi Eŭropon kontraŭ la invado de aziuloj. Kiom da furiozaj bataloj iam sangigis la altajn herbojn de la tiam nekulturata stepo? La kozakoj estis duone sovaĝuloj, sed nur tiaj homoj povis plenumi tian rolon, kaj al ilia ŝirmo nia okcidenta kulturo ŝuldas parte sian ekzistadon.

Tiel mi elvokis la heroan estinton de tiu silenta kamparo, sub la stelplena ĉielo. Ŝajnis al mi kvazaŭ, sur la bordoj de la rivero, kie ni flosis malrapide, mi ĵus ekvidis stariĝantan de post arbo, la altan felĉapon de kozako, spionanta l' alvenon de tataraj rajdistoj... Unu el niaj kunpromenantoj, tre belvoĉa, estis kantanta popolan arion. Mi ne komprenis liajn rusajn parolojn, sed la melankolia kaj sovaĝa ritmo de tiu melodio mirinde vivigis kaj korpigis miajn revaĵojn. Sub la energiaj trajtoj, la ostaj kaj brunaj vangoj, la brila rigardo de miaj ĉirkaŭantuloj, mi eltrovis, ne tute malaperintajn, post unu centjaro de civilizacio, la polurigitajn postsignojn de l' praavaj instinktoj, la fierecon, la eksplodemecon, la malzorgon, ian malestimon por niaj okcidentaj delikataĵoj, la decidemecon kaj la belan ŝatemecon al ĉio danĝera kaj riskoplena, kiu karakterizas la popolojn, junajn kaj estonte kreskontajn.

—Rigardu tiujn dektrijarajn knabojn,—diris al mi s-ro Speranskij,—malgraŭ ilia gimnaziana uniformo, ilia okcidenta kulturo, ili restas efektivaj kozaketoj. Se vi falus en la riveron kaj estus en mortiga danĝero, kvankam ili ne scius naĝi, estu vi certa, ke neniu el ili ŝanceliĝus por sin ĵeti en la akvon kaj riski dronon pli vole ol sin kovri per honto, lasante gaston perei sen helpo.

Kaj dume mia penso forflugis malproksimen al niaj parizanaj dandetoj, kiuj hontus iri en la liceon sen gantoj, kaj timas malvarmumi, kiam ili malsekigas siajn lakitajn ŝuetojn en strata rivereto...

Miaj kozakidetoj ne timis malvarmumon kaj tion baldaŭ pruvis al mi. Dum nia parolado ni ne estis rimarkintaj, ke la steloj super niaj kapoj iom post iom estingiĝis, kaj ni atentis tion nur tiam, kiam nigra nubo kovris la palhelan lunon kaj lasis nin en plena mallumo. Samtempe malproksima tondro sciigis nin, ke ni devas akceli nian returnon. Ni do rapidigis nian remadon laŭeble por alveturi en la urbon antaŭ la pluvego, sed niaj penadoj estis vanaj. Pli kaj pli ofte, fulmoj strekis la mallumaĵon, heligante per blindigaj fajraĵoj la nigran kamparon dum la aero pleniĝis per senĉesa

tondrado. Kaj, ho ve! baldaŭ sin verŝis sur niajn dorsojn efektiva akvofalego: akvo supre, akvo sube, ni povis nur elekti inter pluv- aŭ riverbano!

Ni kovris per niaj supervestoj nian junan akompanantinon, kiu bonhumore ŝercis pri sia akvumiĝado. Niaj knaboj estis feliĉegaj kaj ridegis, dum ĉielaj torentoj fluegis tra iliaj maldikaj ĉemizetoj. La forto de l' pluvego estis tia, ke ni devis momente allasi la remilojn, por kaŝi nin sub la benkoj de l' boato, kiu libere flosis laŭ la fluo.

Kiam ni albordiĝis kaj reiris hejmen, niaj vestoj estis enpenetritaj de akvo, kvazaŭ ni estus elirintaj el la rivero mem; malvarmeta vento algluigis ilin malagrable kontraŭ nia tremetanta haŭto. Sed tiu deviga bano ne havis malbonan sekvaĵon, krom por la nova ĉapo de nia kunpromenantino, kiu faris en tiu tago sian unuan kaj lastan servadon, kaj, ho ve! por la nekozaka verkanto de tiu rakonto, kiu ekkaptis fortan reŭmatismon kaj devis restadi hejme dum kelkaj tagoj ĝis sia resaniĝo.

Tamen tiu malliberigo ne estis al mi maldolĉa, dank' al la tute patrinindaj flegoj de s-ino Speranska, al miaj longaj babiladoj kun mia amiko, ankaŭ dank' al la vizitoj, kiujn mi ricevis.

Efektive dum mia ĉeestado en Sumi tiu urbeto ĝuis du gravajn kuriozaĵojn: la bestejon de ia s-ro Salomon kaj min mem. Mi estas nature modesta homo kaj ne ŝatas fanfaroni. Sed la veremeco devigas min konstati, ke mi atingis sukceson preskaŭ tiel fortan ol la kvardek pensiuloj de s-ro Salomon. Vane tiu intrigulo starigis sian tendegon precize antaŭ nia domo; vane lia gurdego, ĉiutage post la triahora manĝado mueladis sian plej allogan ariaron, de la "Norma" ĝis, ho surprize!—"*En rev'nant de la R'vue*", la popola kanto pri generalo Boulanger. Mi certigas al miaj legantoj, ke s-ro Speranskij ne uzis gurdegon; mi estis sola kontraŭ kvardek; tamen mi ricevis publikon, se ne tiel multan, almenaŭ pli ŝatindan ol la bestoj de s-ro Salomon. Eĉ sinjorinoj kaj fraŭlinoj subite ekmemoris, ke de longe ili intencis viziti s-inon Speranska kaj ŝiajn gefilojn, kaj—ne atendite! renkontis ĉe ili la strangan fremdulon, kiu parolas per artefarita lingvo. La rusinoj, tion mi jam diris, estas seriozaj personoj, sed ili estas virinoj, t. e. idinoj de nia praavino Evo kaj tial, iomete scideziraj! Pri tio mi tute ne plendas, ĉar tio permesis al mi profiti agrablajn konversaciojn, dank' al la nelacebla komplezo de miaj esperantaj tradukistoj.

Cetere kelkaj el miaj kunparolantinoj povis iom paroli france, sed mi neniam povis atingi, ke ili bonvolu uzi mian lingvon. Tiun obstinan rifuzon mi konstatis ankaŭ ĉe la viroj, kaj tio tre mirigis min. Sed mia amiko klarigis al mi la kaŭzon de tiu ŝajne kaprica konduto. En Rusujo la franca lingvo estis antaŭe uzata de la superaj klasoj, kiuj eĉ afektis iafoje ne scii sian nacian lingvon. Hodiaŭ estas reakcio favora por la rusa lingvo; tamen ankoraŭ nun la kapableco paroli france estas konsiderata kiel la vera pruvilo de la monduma eleganteco. Kiu ajn deziras ĝui la famon de delikata

klerulo, pretendas esti kapabla paroli france. Sed, efektive plejmultaj ne scias bone tiun malfacilan lingvon; pro tio ili ne kuraĝas uzi ĝin antaŭ francoj, ĉar iliaj eraroj, nepre rimarkotaj de ilia aŭskultanto, igus ilin mokindaj, kiel homojn kiuj penis vane por sin plialtigi super sia reala situacio.

Post kelkaj tagoj, mi estis sufiĉe resaniĝinta, por ke mi povu promeneti eksterhejme kaj konatiĝi kun la urbo, kies mi estis provizora loĝanto.

IV.

Sumi, ĉefurbo de "ŭezd" (subprovinco) de la provinco Ĥarkov, enhavas 34000 loĝantojn; ĝi sidas apud la Psjol, rivero, alfluanta al la riverego Dnjepr kaj apud la fervojo de Kiev al Ĥarkov. Ĝia aspekto estas tre malsimila je tiu de franca urbo egale homplena. Ĝi konsistas el du partoj, tute diferencaj—longa vico de stratoj, iranta de la stacidomo al la tombejo kaj havanta ŝajnon tre "urban", kaj, ĉirkaŭe, aro de vastaj posturboj, similaj je vilaĝoj pro siaj dometoj eĉ iafoje kun tegmentoj el pajlo. Se vi uzas unu el la tieaj veturiloj, lueblaj por malmultekosta prezo, kaj veturos longe de la centra strataro, vi renkontos preskaŭ ĉiujn rimarkindaĵojn de tiu urbeto: la malsanulejon, la eklezian lernejon, la geknaban kuracejon tre bone organizatan, la luteran preĝejon, la gimnazion por junuloj, kiu donas duagradan instruadon kun latina kaj greka lingvoj, la unuagradan lernejon, konstruaĵon tre belan sed tre malsufiĉan por tridekkvarmila loĝantaro, la malluksan katolikan preĝejeton por la poloj. Tie la strato kurbiĝas, transpasas per tre malglata ligna ponto super rivereto, alfluo de la Psjol, la Sumka (pendsaketo), kiu donis sian nomon al la urbo kaj ĝin ŝuldas mem al la sekvanta legendo: Kolonelo de kozaka lando Gerasim Kondratev perdis iam la kason de la regimento, kiun li havis en pendsako kaj portis al la hetmano aŭ reĝo. Malesperante, li ĵuris, ke se li ĝin retrovos, sur la loko mem li konstruos preĝejon. Li trovis tiun sakon en la rivereto Sumka, plenumis sian promeson kaj la konstruita preĝejo estis la deveno de la nuna urbo Sumi, kiu pro tio metas en sian blazonon tri pendsakojn.

Daŭrigante vian veturadon trans la Sumka vi renkontos la ortodoksan preĝejon de sankta Nikolao, la gimnazion por junulinoj, kaj, en ĝardeneto belan kaj riĉan ĉefpreĝejon (sobor). Poste estas bela publika ĝardeno kun la statuo de ĝia donacinto s-ro Ĥaritonenko; la "reala" lernejo, rimarkinde aranĝita, kie oni ricevas duagradan instruadon, sen mortintaj lingvoj. Fine, post iom kruta deklivo, la senfina strato alvenas en parton, kie estas tri malsimilaj, sed egale gravaj institucioj: 1-e la ŝtata monopola fabrikejo de brando, necesa samtempe al la feliĉo de l' rusoj kaj al tiu de la registara kaso, dank' al kiu ĉiu drinkulo rajtas proklami fiere, ke li ebriiĝas pro patriotismo; 2-e la kadeta korpuso aŭ lernejo de oficiroj, egale utilegaj por garantii estonte la trankviligon popolan kaj la trankviliĝon estran; 3-e la tombejo, sola loko en

Rusujo, kiel aliloke, kie ĉiu proletario iĝas frue malfrue bienhavanto kaj ne plu bezonas brandon por ĝojiĝi aŭ armeon por kvietiĝi.

En tiu resuma priskribo, oni certe rimarkis la grandan nombron de duagradaj lernejoj: lernejo eklezia, lernejo de kadetoj, reala lernejo, gimnazio por junuloj kaj gimnazio por junulinoj. Tio eble mirigos, ĉar Rusujo ne ĝuas precize la famon de lando tre "lernejema". Sed la kaŭzo de tiu rimarkindaĵo en Sumi estas, parte, tiu sama Ĥaritonenko, jam nomita, kiu donacis al sia urbo ne nur la publikan ĝardenon, sed ankaŭ la infanan malsanulejon, la ĉefpreĝejon, kaj la kadetan kaj realan lernejojn. Je ĉiu paŝo en Sumi, oni renkontas la pruvojn de lia malavareco, kaj ne malprave la danka urbestraro starigis lian statuon en la publika ĝardeno de li donacita. S-ro Ĥaritonenko estis simpla muĵiko, saĝega kaj laborema, kiu gajnis multajn milionojn per la fabriko de sukero. La vastega fabrikejo, fondita de li, kuŝas apud la stacidomo; ĝi okupas 3,000 laboristojn kaj utiligas la rikolton de la senfinaj kampoj da ruĝaj betoj, kiuj ĉirkaŭas Sumi'n. Je la alia flanko de la stacidomo, estas ankaŭ belega fabrikejo de ŝtalaĵoj, direktata de Belgoj. La fabrikado de sukero kaj ŝtalaĵoj estas la du precipaj industrioj de Sumi.

Se al tiu denombro, mi almetos la teatrojn, someran kaj vintran, la malliberejon kaj la bazaron, kie la komercaj interŝanĝoj valoras jare pli ol kvin milionoj da spesmiloj, mi estos nominta ĉion citindan pri Sumi en gvidlibro de Joanne aŭ Baedecker. Sed kion mi dezirus ankaŭ montri, estas la speciala fizionomio de la homaro, kiu vivigas tiun ordinaran urbeton kaj igas ĝin interesega por okuloj de fremdulo kiel mi.

Ekzemple, mi volus pentri la lignajn budojn de l' bazaro, provizatajn per objektoj utilaj al la kampara kaj simpla klaso: botoj el ledo aŭ el felto, "lapti" aŭ sandaloj, faritaj el tilia basto, helkoloraj katunoj, maldelikataj potaĵoj, samovaroj, tranĉiloj, kuleroj el kolorigita lignaĵo, diversaj piecaĵoj, sanktaj figuroj (ikonoj) kaj malkaraj bulkalkuliloj, ĉar en Rusujo, neniu kalkulas sen tiu ilo. Sur la skribtablo de ĉiu oficisto, sur la vendotablo de ĉiu komercisto vi nepre ĝin trovas. Kiam via spicisto enpakigis viajn aĉetaĵojn, tuj li sin turnas al siaj "sĉjoti" (kalkulilo) kaj rapidege puŝas la lignajn buletojn por sumigi vian ŝuldon; sen ĝi, kasisto ne povus starigi bilancon, li per la "sĉjoti" kalkulas preskaŭ tiel rapide, kiel ni per krajonoj, kaj mia amiko pretendas, ke tiu metodo estas preferinda por longaj laboroj, ĉar ĝi postulas fingran laboron pli ol cerban kaj ne lacigas.

Apud la budoj de la bazaro, sur vasta placo estis la vendejo de l' brutoj kaj ĉevaloj kaj, fine, la longaj vicoj da malaltaj ĉaretoj, senĉevaligitaj kaj plenaj da fojno, melonoj, brasikoj, akvomelonoj kaj precipe da kukumoj kaj bruegantaj porkoj, tiuj du fundamentoj de la tiea nutrado. Meze de tio sin movis, kviete kaj silente, multego de muĵikoj kaj muĵikinoj, kun flegmaj vizaĝoj, kie la interna penso sin malkaŝis nur per la viglaj kaj mokemaj okuletoj. Tie ĉi kaj tie, blinda almozulo, sidante sur la pavimo,

ludis per "balalajka" (trikorda gitaro), per akordiono aŭ violongurdo, kaj kantis antikvajn malgrandarusajn ariojn pri la heroa tempo, kiam la praavoj kozakaj bataladis kontraŭ la tataroj aŭ la poloj. Ĉirkaŭ li, muĵika aŭdantaro aŭskultis atente, kaj de tempo al tempo ĵetis kopekon (spesdekon) en lian lignan pleteton.

Por observadi la simplularon, taŭga loko estas ankaŭ la ortodoksaj preĝejoj, kiuj ludas en la publika vivado gravan rolon. La rusa eklezio, en sia tuteco, kun sia pastraro kaj monaĥaro, estas nur parto de la ŝtata maŝino. El tio rezultas, ke ĝi ne povas, kiel la sendependa katolika eklezio, havi konfliktojn kun la registaro, de kiu ĝi estas, kontraŭe, la plej utila helpanto, aldonante per sia religia kunagado, dian karakteron al la aŭtokrata organizacio. Nenia oficiala ceremonio okazas sen la partopreno de la ekleziuloj.

Aliparte, se la prireligia libereco ekzistas oficiale en Rusujo, ĝi, en la realeco, ricevas strangajn limigojn, kiuj igas ĝin tre simila je mallibereco[2]. Ekzemple se la registaro instigas kaj helpas la propagandon porortodoksan, ĝi severe malpermesas kaj punas la propagandon kontraŭortodoksan; ĉiu neortodoksulo povas konvertiĝi je la ŝtata religio, sed, male, nenia ortodoksulo leĝe, povas iĝi neortodoksulo. Ĉiu ortodoksulo devas fari konfeson kaj komuniiĝi almenaŭ unu fojon po ĉia jaro, kaj la regnaj oficistoj devas konstatigi, ke ili plenumis tiun devon, per atestilo de la konfesprenanto. Se oni atentas, ke multaj rusaj kleruloj estas tute nereligiaj, oni komprenos, ke tia devigo iĝas nur administracia deĵoro, en kiu la pastro ludas strangan rolon. Sed tio ne ofendas la skrupulecon de la ortodoksuloj, ĉar, kiel la islamanoj, ili ne faras diferencon inter la ŝtato kaj la eklezio, inter la devo patruja kaj la religia devo, kaj konsideras la pastrojn, kiel efektivajn funkciulojn.

[2] Informoj freŝe ricevitaj sciigas min, ke nun la religia situacio de la rusoj pliboniĝis.

Tio komprenigas, ke la simpluloj timas la pastrojn, kvankam ofte ili ne estimas ilin, ĉar ili rigardas ilin samtempe kiel rajtigitulojn de la reĝa potenco, kaj kiel drinkemajn parazitojn kiuj vivas je ilia domaĝo. Kaj tiu riproĉo estas ofte prava, sed pri tio ne la pastroj solaj estas respondaj. Kian indecon povas konservi tiuj kompatindaj homoj, ofte patroj de multenombra idaro (ili ricevas pastran oficon nur kiam ili estas edziĝintaj), kiuj ĝuas nur tre nesufiĉan salajreton kaj devas mem postuli, iel ajn, de siaj paroĥanoj, la religian imposton, nepre necesan por ke ili povu vivadi? Ilia funkcio estas efektive hereda, kaj vivadante de multaj generacioj meze de la muĵikoj kaj per ili, la vilaĝaj ekleziuloj nepre alprenas iliajn morojn, maldelikatajn kaj malsobrajn.

Ĉu la simplularo rusa, kiu ne respektas siajn pastrojn, estas vere religiema? Tion mi ne kredas. Ĝi estas nur tre superstiĉema. Ĝia religia kompreno ne altiĝis super iaj

difinitaj agoj kaj ceremonioj, iaj piecagoj al ia ikono aŭ sanktulo, efektive loka diaĵo. Reale ĝi restadis ĝis nun idolano, kiel dum la pasinta tempo, kiam ĝi adoris siajn antikvajn "peruni"; nur tiuj diaĵoj ŝanĝis siajn nomojn kaj aliformiĝis je kristanaj sanktuloj.

Rigardu tiun kamparanon aŭ tiun laboriston, kiu eniras en preĝejon. Li singarde marŝas, kaj timeme rigardas ĉirkaŭen, kvazaŭ li timus ofendi nevole ian kaŝitan potencon, kiu tuj lin tondre frapus. Li haltas, li klinas sian kapon, li kruce kunmetas siajn brakojn, genufleksas, li frapas kontraŭ la pavimo sian frunton, li faras multegajn krucesignojn tiel rapide, ke apenaŭ mia mirigata okulo povas sekvi la movojn de liaj tri fingroj, kunstreĉitaj por memorigi la tri personojn de la Sankta Triunuo. Kaj tion li faras laŭ rito precize fiksita. Ekzemple, se li sin krucosignus per du fingroj anstataŭ tri, tio estus grava peko, ĉar nur la herezuloj "raskolniki" tiel agas por memorigi la duoblan econ, dian kaj homan, de Jesuo Kristo!

Antaŭ tiu pia gimnastiko, mi povus supozi, ke mi estas ankoraŭ en Alĝero, ĉe islama preĝejo, kie arabo estas faranta sian ĉiutagan preĝon. Kaj la simileco estas efektive tre granda, ĉar ili ambaŭ longe kaj severe fastadas, kaj konsideras kiel devo sin korpe purigi kaj sekse deteni antaŭ la gravaj religiaj festoj.

En religio tiom formalisma, la sektoj devis esti kaj estas efektive multnombraj. Tuta libro estus necesa por priskribi ilin kaj ilian evolucion. Ili apartenas al du malaj influoj: tiu de la formalisma tradicio, kaj tiu de la reakcio kontraŭ la formalismo. Ĉiuj, laŭ la inklino de siaj anoj, evoluciis, ĉu al maldelikataj, eĉ diboĉaj aŭ krimaj formoj, ĉu, male al evangelia aŭ nur racionalisma stato. Pri la unua kategorio, mi povas citi la "skakuni" aŭ saltantojn, kaj la "ĥlisti" aŭ vergantulojn, kiuj atingas, per saltado aŭ dancado, kiel la turniĝantaj derviŝoj, staton de mistika ekstazo kaj iafoje finas siajn ceremoniojn per diboĉadoj;—la "skopci" aŭ kastrulojn, pri kiuj mi jam parolis;—la "stranniki" aŭ vagulojn, kiuj komprenas laŭvorte la parolon de Evangelio: "Lasu cian patron kaj cian patrinon, prenu cian krucon kaj sekvu min". Ili forlasas sian familion, forĵetas ĉiun regan aŭtoritaton kaj vagas tra la nordaj arbaroj, vivante per almozoj.

Aliaj sektanoj malakceptas la oficialajn pastrojn, pro tio, ke ĉi tiuj ricevis la pastrordenon de episkopoj, uzantaj la tekstojn de la Sankta Skribo, korektitajn de la patriarko Nikono dum la XVII-a centjaro; tial, aŭ ili kreis al si specialan sekretan pastraron kaj estas nomataj pastruloj (popovci), aŭ ili opinias, ke ne estas plu rajtaj episkopoj kaj pastroj; sekve tiuj "bezpopovci" (senpastruloj) forĵetas ĉiujn sakramentojn, krom la bapto, kaj anstataŭigas ilin per simbolaj kaj rememorigaj ceremonioj. Tiel, pro troa formalismamo, ili alvenis al la sama rezultato kiel la evangeliaj aŭ racionalismaj sektanoj, kiuj ankaŭ forĵetas la pastraron kaj la sakramentojn, ĉar ili ne akceptas ian perulon inter Dio kaj si. Tiaj estas la "duĥobori" aŭ spiritforteguloj, la "molokani" aŭ laktotrinkuloj, kaj, fine, la "ŝtundisti".

Tiuj lastaj sektanoj estas la plej multnombraj en Malgrandrusujo kaj faras rapidajn progresojn. Ilia kredo estas tre simila je tiu de la germanaj anabaptistoj kaj anglaj baptistoj. Ili havas nek pastrojn, nek sakramentojn, krom la bapto, nek ikonojn. En iliaj kunvenoj aŭ "ŝtunden", ili nur kantas psalmojn kaj himnojn, kaj legas Biblion. Tial multaj el ili scias legi kaj ĉiuj estimas la klerecon. La intelekta stato de la ŝtundistaj muĵikoj estas ĝenerale tre supera je tiu de la kamparanoj ortodoksaj. La ideoj liberemaj kaj sendependemaj sin enŝovas en iliajn vilaĝojn kun la libereco de religia diskutado; tial la registaro severe persekutas iliajn propagandistojn kaj sendas ilin en Siberujon eĉ kiel kondamnitojn je punlaboro.

La ŝtundistoj abomenas la ikonojn tiom forte, kiom la ortodoksuloj estimegas ilin, kaj tio kaŭzas ofte vilaĝajn malpacojn, iafoje sekrete okazigitajn de la pastroj, ĉar ĝenerale nur la neortodoksuloj estas punataj. De tio mi povis mem konstati ekzemplon dum mia ĉeestado en Sumi. En Pavlovski, proksima vilaĝo duone ortodoksa, duone ŝtundista, ekestis malpaco inter la du partioj; iom post iom, la afero iĝis pli grava; fine la ortodoksuloj atakis la ŝtundistojn kaj okazis batalo, en kiu kelkaj homoj pereis kaj la ortodoksa preĝejo estis detruata. Granda skandalo, proceso antaŭ la juĝantaro de Sumi, kaj kvankam, dum la batalo, ambaŭ, ŝtundistoj kaj ortodoksuloj ricevis vundojn, tamen nur la unuaj estis kondamnataj je ekzilo en Siberujo. *Dura lex, sed lex.* La juĝistoj ofte estas interne favoraj al tiuj sendanĝeraj liberaluloj, sed la leĝo devigas ilin kondamni, kiam la faktoj estas konstatitaj. Eĉ afablega magistrato, kiu bone parolis france, donis al mi strangan pravigon de tiuj kondamnoj pro religia kaŭzo.

—Kion fari?—li diris.—La ŝtundistoj estas nur malmulto meze de la multego da ortodoksuloj, kiuj ilin malamas. Ili nepre estus dispremataj, se ni ne moderigus per juĝejaj punoj ilian fervorecon...

—Ho! feliĉega lando,—mi pensis,—kie la registaro, por defendi la regnanojn, ilin malliberigas!

Kredeble mia vizaĝo esprimis mian penson, ĉar mia kunparolanto aldiris por kvietigi miajn skrupulojn.

—Cetere, se, obeante la leĝon, ni kondamnas ilin, poste ni ofte ilin rekomendas al la favora indulgeco de lia Imperiestra Moŝto. Kaj jen, nia regnestro ĵus bonvolis malgravigi je ses monatoj de malliberiĝo en Sumi la punon de ekzilo en Siberujo, juĝedonitan al la ŝtundistoj de Pavlovski. Se vi volas, vi akompanos min morgaŭ dum mi vizitos la malliberejon kaj anoncos tiun indulgan decidon al la interesatoj.

Viziti malliberejon ne estas tempopasigado tre ĝoja, kaj en alia lando kredeble mi ne estus akceptinta. Sed la rusaj malliberejoj, kiel dum la tempo de Silvio Pellico, la

plumbaj tegmentoj de Venezia,—havas literaturan famon. Dostojevskij montris ilin kun ilaro de vergoj kaj skurĝoj, kiuj iom similigas ilin je mezepokaj karceroj. Kiom prava estas tiu famo? Mi estis iom deziranta vidi mem tion, kaj al mi ŝajnas, ke tiu magistrato ne malpli deziris doni al mi, fremdulo, la eblecon fari tiun konstaton.

Mi konfesas, ke mi sentis min iom impresata, kiam la multpeza pordego de la malliberejo malfermiĝis antaŭ mi. Kiom da homoj jam estis tien enirintaj, eble lasante, laŭ la esprimo de Danto Alighieri, ĉiun esperon?.. Kion mi ĵus vidos trans tiu mistera pordego?

Sed la interna aspekto de la malliberejo tuj disrevigis min. Antaŭ miaj okuloj estis tre ordinara korto kaj unuetaĝa konstruaĵo ankaŭ tute ne speciala. Nenio, krom la fenestraj kradoj, konigis, ke ĝi estas malliberejo.

Al mi alkuris la tiea direktoro, ĵus informita pri nia vizito. Li haltis je tri paŝoj antaŭ ni, rigide staris, metis parade sian manon kontraŭ sia ĉapo, rekte rigardante al la okuloj de mia kondukanto.

—Mi deziras la bonsanecon de via altekscelenco, li diris. Mi havas la honoron raporti al vi, ke en la komisiita al mi malliberejo ĉio bone estas. Ĝi enhavas 96 arestatojn. El tiu nombro 23 estas...

—Bone,—diris la estro. Estu vi sana.

Poste, la direktoro respondis diversajn demandojn de mia kunulo, salutante kaj ridetante kun servema zorgo, dum li atente observadis la vizaĝon de l' superulo, kvazaŭ li dezirus sur ĝi ĉiun ekdezireton ekkapti por tuj ĝin plenumi eĉ antaŭ ĝia esprimiĝo. Sed, kontraŭe, kiom li rigidiĝis kaj fieriĝis, kiam, per severa tono, li alvokis sian subulon, unu el la ĉefgardistaj moŝtetoj!

Ree fariĝis la parada ceremonio jam supreskribita.

—Mi deziras la bonsanecon de via altanobleco. Mi havas la honoron raporti al vi, ke en la komisiita al mi koridoro estas 58 arestatoj. El tiu nombro du estas en la malsanulejo, dekkvar laboras ekstere...

—Bone, interrompis la estro. Estu vi sana.

Nur eĉ pli humile kaj pli modeste la ĉefgardista moŝteto estis parolinta.

Grave ni eniris la malliberejan domon, kaj supreniris al la unua etaĝo. Tie kuŝis laŭ la tuta longo de la konstruaĵo, vasta koridoro kun du vicoj de fortikaj pordoj serure kaj

riglile fermataj. Ĉiuj havis kvadratan fenestreton, tra kiu oni povis rigardi en la karcerojn. Kelkaj subgardistoj paŝadis en la koridoro.

Per laŭta voĉo, kiu tondre resonadis en la tuta ĉambraro, la fieriĝinta ĉefgardisto anoncis nian viziton. Tuj la subgardistoj parade streĉiĝis, kaj el la karceroj aŭdiĝis eĥe movbruo de la ŝlosituloj, kiuj ankaŭ sin preparis por ricevi vizitanton.

Kaj, dum mi modeste staris iom malantaŭe, sub mia rigardo okazis kurioza ceremonio.

Laŭ la komando de la magistrato, subgardisto malfermis pordon. Kaj jen, aperis, envicigataj, kelkdekduo da malliberuloj, parade starantaj, ĉiu tenante en sia dekstra mano sian individuan notlibreton. Ĉirkaŭe, kvar nudaj muroj, en unu, krada fenestreto, en alia, kaveto por meti lampon, en unu angulo, sankta ikono, en alia, nokta sitelo. Nenio plie. Vespere oni donas al ĉiu koverton, por dormi sur la planko.

La magistrato eniris.

Ĉiuj streĉiĝis, staris senmovaj antaŭ li.

—Mi deziras la bonsanecon al via altanobleco,—diris la subgardisto.—Mi havas la honoron raporti al vi, ke en la komisiita al mi ĉambrego estas 15 arestatoj. El tiu nombro...

—Bone,—diris la magistrato, kaj sin turnante al la malliberuloj:

—Estu vi sanaj,—li diras.

Kaj ĉiuj, samtempe, kiel puŝataj de unu sama risorto, ekkriegas:

—Ni deziras la bonsanecon de via altanobleco!

El mia loko, mi observadis scivoleme tiujn malliberulojn. Ĉiuj havis vizaĝojn ĝenerale malbelajn kaj vulgarajn de simpluloj, kiuj neniam sin altigis super la trivialaĵoj de maldelikata kaj kruda vivado. Kelkaj montris trajtojn de hardiĝantaj krimuloj, rebriligantajn la malvirtojn, kiuj alkondukis ilin ĝis la juĝeja benko. Sed ĉiujn karakterizis disciplina instinkto, kiu rigidigis ilin en parada sintenado.

La magistrato alparolis kelkajn el ili, ĉiuj respondis kiel soldatoj al sia generalo. Oni sentis, ke super ĉiu alia individua instinkto, priokupadis tiujn rusajn kondamnitulojn la granda afero stari laŭ la regulo.

Ĉiuj karceroj estis vizitataj unu post alia, kaj ĉiafoje ripetiĝis tiu sceno. La virinoj estis aparte enŝlositaj en ĉambroj, similaj al tiuj de l' viroj. Ili ankaŭ parade enviciĝis kaj soldate staris antaŭ la vizitanto: la milita rusa disciplino ne distingas la seksojn!

La ŝtundistoj ankaŭ estis en speciala ĉambro, kaj mia koro premiĝis, kiam oni ĝin malfermis. Modestaj kaj admirindaj nekleruloj, pioniroj de la slava penslibereco ĉe la popolo, kulpaj nur pri intelekta supereco kaj kondamnitaj nur pro politikaj interesoj!

Ĉar oni arestis ilin are, edzinojn kun edzoj, oni devis ankaŭ enŝlosi iliajn geknabojn, por ke ili ne mortu pro malsato, kaj unu virino, kiu vicestaris, portis sur sia brusto mamsuĉuleton! Sur la vizaĝoj de tiuj honestuloj mi povis konstati nek fanatikecon, eĉ nek koleran senton, nur la slavan stoikismon, kiu toleras ĉion pacience kaj ridetante, ĝis tiu momento kiam ĝi neatendite eksplodos. Nur mi ne rimarkis ĉe ili la sklavindan fervorecon de la aliaj malliberuloj por saluti la superulon, kiu vizitas ilin; plejĝustadire, ili sin montris intence indiferentaj, kaj okazaĵo montris al mi la firmecon de tiu intenca sintenado.

Post la paradaj salutoj, la magistrato anoncis al ili la indulgan decidon de la imperiestro, kiu bonvolis ŝanĝi ilian ekzilon en Siberujo je nur sesmonata malliberiĝo en Sumi. Dum li parolis, radioj de julia suno tra la kradita fenestreto heligis la severan karceron: kiom bela kaj bonodora devis esti la florplena kamparo; kiom dolĉe devis esti, libere, plenbruste, enspiri la stepan venteton, sidante sur la perono de la hejma dometo! Mi supozis, ke la baldaŭan liberiĝon salutos ĝojaj kaj dankaj ekkrioj...

Ĉiuj silentis kaj restis senmovaj.

Kaj tiu impresiga respondo memorigis al mi la faman parolon:

Popola silento la reĝojn instruas!

Restis nur por viziti tri politikaj kondamnitoj. Ĉiu ĝuis apartan ĉambron, kun la neevitebla ikono, fera liteto, unu tableto, unu seĝo, unu lampo, libroj kaj skribilaro; oni ne devigis ilin fari la paradan saluton, nek vesti la livreon de la malliberejo. La kaŭzo de ilia puno estis la disdonado de revoluciemaj propagandiloj kaj la plej maljuna el tiuj homoj estis apenaŭ dudekdujara; unu ne estis ankoraŭ dekokjara!

Je la eniro de la magistrato, ili leviĝis, ĝentile salutis, kaj atendis kun bonhumora, kvazaŭ rideta mieno. Mi rigardis ilin dum ili parolis sen aroganteco kaj sen ĝeno kun li, kiel egalulo respondas al egalulo, kiu faras al li viziton pro ĝentileco. Kaj tiu sintenado de tiom junaj homoj antaŭ potencega magistrato ŝajnis al mi ne malpli signifa, ol la malkvietiga silento de la ŝtundistaj muĵikoj: tian trankvilecon povis doni nur firma konfido je la estonta triumfo!

Pli ol unufoje mi rememoris tiun viziton, kiam, reirinte en mian landon, mi legis en la gazetoj la detalojn de la revolucio, kiu diskrevis en Rusujo post kelkaj monatoj.

Jam dum la tempo de mia ĉeestado estis antaŭsignoj de la estonta agitado; tamen la lando ne estis tiel malpaca, kiel mi supozis antaŭ mia alveno. Mi jam diris, ke en Konstantinoplo oni konsilis al mi forlasi, pro ĝia danĝereco, mian intencon vojaĝi en Rusujon: oni ne atentis, ke se unu deko da lokaj ribeloj sufiĉas por plenigi la paĝojn de l' gazetoj, ili estas kvazaŭ nenio proporcie kun la vastegeco de la rusa imperio. Miaj konsilantoj kaj mi mem estis trompataj de tiu kvazaŭa optika iluzio, pro kiu la francaj kamparanoj, leginte ĉiutage la krimojn, faritajn en iaj lokoj de Parizo, supozas, ke la mortigoj estas kutimaj kaj oftaj en ĉiuj stratoj de tiu urbego, kaj pro tio singarde promenas sur ĝiaj stratoj kun malfida antaŭtimo.

Reale, dum mia sessemajna restado kaj miaj ira kaj returna vojaĝoj en la sudokcidenta Rusujo, mi povis konstati mem nenian tumulton. Sed tio ne signifas, ke ĉio estis vere kvieta; kontraŭe, eĉ en la lokoj, kiel Sumi, kie ne okazis strataj malpacoj, la spiritoj estis ekscitataj. Tiam estis la lasta kaj plej malfeliĉa periodo de la milito kontraŭjapana, tuj post la detruo de la rusa ŝiparo en Cushima. Tiu milito, kiu neniam estis populara en Rusujo, fine naskis unuvoĉan malaprobon, kaj mi povis tiam konstati kun miro, ke la simpatio de la rusoj plivole sin turnis al la japanaj armeoj, ol al siaj batalantaj samnacianoj. Ĉar mi montris min iom skandalata de tiu animstato, ia ruso iafoje respondis al mi.

—Kion ni rajtas riproĉi al la japanoj? Entute, ni solaj estas respondaj pri tiu milito, ĉar ni devigis ilin ataki, malfermante al ili la vojon de la kontinenta elirejo, necesa por la troeco de ilia plimultiĝanta loĝantaro. Ĉu ni, kontraŭe, bezonas tiun malriĉan, malproksimegan Manĝurujon, kiam en Rusujo mem estas vastegaj fruktodoneblaj landoj, ne ankoraŭ plugataj? Ĉio en tiu bedaŭrinda milito estas por ni malaprobinda. Ĉu en ĝi ni ludas belan rolon, riskante haltigi intermeze de ĝia disvolviĝo, la mirigan aliformiĝon de tiu nacio, kiu, laŭ ĝis nun ne konstatita ekzemplo, dum nur tridekjaroj evoluciis el nepoluriteco inda je la Mezepoko ĝis tute moderna civilizacio? Kial perdi en tiu milito, senutile, milionojn da rubloj, kiam ni ne povas sufiĉe profiti niajn kampojn, pro manko de vojoj, fervojoj kaj pontoj? Kvankam ni tutkore kompatas niajn malfeliĉajn fratojn, batalantajn en Orientazio, ni estas preskaŭ devigitaj deziri la sukceson de Japanujo, ĉar kredeble tio estos por ni kaŭzo de liberala evolucio, kiel okazis post la milito de Krimeo, kiun sekvis la liberiĝo de la servutuloj. Kontraŭe, se nia armeo fine venkos, la reakcio iĝos pli potenca kaj niaj kapitaloj daŭros forflui en Manĝurujon, por la utilo de nur malmultaj spekulaciistoj.

Tion, ne nur oni diris private, sed oni komencis ripeti malkaŝe, kaj senĉese plifortiĝis tiu popola malkontenteco, kiu kaŭzis la ribeladon de la sekvanta vintro.

Cetere se mi konstatis mem nenian malpacon dum mia restado, tamen kelkaj okazis en la ĉirkaŭaĵo, ĉu en Lebedin, alia urbeto de la sama gubernio, ĉu en proksimaj vilaĝoj.

Mi memoras, ke iafoje mi promenis kun mia amiko sur la stratoj de Sumi, kiam ni renkontis roton de kozakoj, revenantaj el vilaĝo, kiun ili estis "kvietigintaj". La soldata metodo de kvietigo en Rusujo similas la malhonore memorindajn "dragonnades" de nia reĝo Ludoviko Granda. La kozakoj simple loĝas ĉe la pacigotaj muĵikoj, manĝas ilian panon, trinkas ilian "kvason" aŭ brandon, kuŝas ĉe ili, insultas kaj batas ilin, se bezone, perfortas iliajn edzinojn kaj filinojn, aŭ brulas iliajn domojn. Kompreneble, post kelkaj semajnoj de tiu energia disciplino, la kamparanoj iĝas tute kvietaj kaj la kozakoj revenas fiere en sian garnizonon.

Precize triumfan revenon de tiu speco mi tiam havis okazon vidi. Niaj ĝojaj kaj bruemaj, al mi ŝajnas iom ebriaj—herooj staris sur siaj belaj ĉevaloj, en vere graciaj bluaj uniformoj je ruĝaj refaldaĵoj kun koketaj felĉapoj. El ilia manradiko pendis la vipo, kiu igis ilin famaj en la tuta mondo. Kelkaj frapis sur tamburetoj kaj cimbaloj dum ĉiuj kantis diverstone militan kanton je stranga ritmo. Antaŭ ili la pasantoj silente kaj singarde flankeniĝis kun malsimpatia rigardo.

—Al mi preskaŭ ŝajnis,—mi diris al s-ro Speranskij,—kiam ni estis hejme, ke mi vidis eniron de venkintoj kapitulaciitan urbon.

—Via rimarko estas prava,—li respondis.—Tiuj rilatoj, strangaj inter regnanoj de sama lando, elvenas de tio, ke la rusa militistaro entute ne konscias pri sia reala rolo en la societo, kaj havas inklinon kredi, ke ĝi estas kvazaŭ aparta kaj supera gento de la nacio. Tiu malvera sento estas iom komprenebla ĉe la kozakoj, kiuj de centjaroj vivas aparte kun siaj edzinoj kaj idoj kaj estas soldatoj dum la pli granda parto de sia vivo, kaj pro tio havas specialan idearon. Sed tion oni povas ankaŭ konstati, kvankam malpli senteble, ĉe la aliaj regimentoj. Tiun animstaton mi aljuĝas al tiu cirkonstanco, ke la plejmulto de la soldatoj estas nekleraj kamparanoj, tute konfuziĝantaj en la garnizona vivado de la urboj, kie ili sin sentas malhejme kaj iĝas nur senrezonaj iloj en la manoj de siaj oficiroj; tiuj ĉi, siaflanke, estas de ilia juna knabeco edukitaj en kadetaj lernejoj, kiuj apartigis ilin el la cetera klerularo.

Tiu metodo, kompreneble, igas la oficiraron mirinda ilo de la aŭtokrata registaro, sed ĝi havas multajn malbonajn konsekvencojn pri la ĉiutagaj rilatoj inter la militistaj kaj nemilitistaj homoj. En Rusujo ne estas efektiva barilo kontraŭ la kapricoj de la oficiroj krom ilia mema saĝeco, kaj tiu barilo ne sufiĉas, kiam la oficira vesto kovras viron trivialan, malbonan, aŭ—tio okazas iafoje—malsobran.

Multaj estas la rakontoj pri la kapricoj de la oficiraj moŝtoj. Mi memoras, ke s-ro Speranskij bone ridigis min per tiu de ebria oficiro, kiu, ian tagon, sidiĝis tra la

laŭlonga koridoro de fervoja vagono, komforte apogis sian dorson kontraŭ unu el la tabulmuroj, metis siajn etenditajn krurojn kontraŭ la alia, kaj trankvile ekbruligis cigaron, obstrukcante per sia korpo la tutan pasejon. Kiam la vagonaro haltis ĉe stacio, kelkaj gevojaĝantoj dezirantaj foriri, petis, ke li lasu ilin preterpasi. Sed kun obstineco de drinkulo, li rifuzis.

—Se vi deziras preterpasi,—li nur respondis,—nu, saltu super miaj kruroj!

Ĉiuj protestoj estis vanaj. La malfeliĉaj gevojaĝantoj devis postuli la helpon de la vagonarestro. Tiu oficisto ĝentile salutis kaj petis la oficiran moŝton lasi la pasejon libera. Senrezultataj penoj. En sia malespero, la vagonarestro devis, siavice, alvoki policiston. Tiu ĉi alproksimiĝis, hezitante, faris militistan saluton, kaj per tremetanta voĉo petegis la oficiran moŝtegon bonvoli iomete faldi siajn krurojn...

—Silentu, porkido, estis la ordona respondo, kaj tuj saltu!

En Rusujo, la policistoj estas soldatoj, submetataj je la militista hierarĥio: la timeganta policisto tuj obeis kaj saltis!

Tiun rakonton oni devus aŭdi, diratan kaj gestatan de mia amiko. S-ro Speranskij estas mirinda rakontisto, kiu, laŭ la esprimo de nia franca fablisto La Fontaine, multon vidis kaj multon memoris. El lia facila esperanto fluadis senĉese anekdotoj ĉu spritaj, ĉu seriozaj, ĉiuj karakterizaj, kiuj aperigis laŭ vigla kaj vivŝajna aspekto la homojn kaj aĵojn de Rusujo. Vice li pentradis al mi la vivadon de la kamparanoj, de la urbanoj, tiun, tre specialan, de la riĉaj komercistoj, kiuj konservis ĉiujn tradiciojn de la antikva Rusujo;—la morojn de la Krimeaj Tataroj, similantajn tiujn de niaj islamanoj de Alĝerio, la strangajn kutimojn de la Baŝkiroj, duonsovaĝuloj loĝantaj en la gubernio Orenburga, kiuj sin nutras per ĉevalaĵo, sed antaŭe metas ĝin sur la dorson de siaj vivantaj ĉevaloj, uzas ĝin kiel selon kaj ĝin manĝas nur kiam ĝi estas sufiĉe premegata de la korpo de l' rajdistoj kaj enpenetrata de la ŝvito de l' ĉevaloj. Aliajn fojojn, mia amiko prenis el sia biblioteko ian verkon de la rusa poeto, aŭ de Tolstoj, prefere de Gogol, la glora kantisto de Ukrajno kaj satiristo de la tiama rusa societo, kaj li tradukis rekte en Esperanton paĝon el ili, klarigante al mi ĉiujn aludojn, ĉiujn apartaĵojn, ne kompreneblajn por fremda leganto. Kaj dank' al lia vivplena komentario, al liaj multegaj rakontoj, tiu stranga Rusujo, tiel malsimpla kaj konfuza en sia nuna transira stato, disvolviĝis antaŭ miaj okuloj, kiel per magia kalejdoskopo, iĝis por mi pli kaj pli konata, pli kaj pli kutima kaj simpatia.

Ofte, dum la vespero, lia fratino kaj ŝia edzo partoprenis en niaj paroladoj. Kvarope, ni faris familian rondon ĉirkaŭ s-ino Speranska en la salono. La patrino kaj bofrato de s-ro Speranskij apartenas al tiu nobla aro da homoj, kiuj en Rusujo sin dediĉas al la klerigo de siaj malkleraj fratoj, kun fervoro memoriganta tiun de la primitivaj

kristanoj. Ŝajnas ke, perdinte siajn antaŭajn kredojn, ili bezonas novan kvazaŭ religian idealon, kaj ĝin trovas, en sia entuziasmo por sia instruista misio. Tiel, malgraŭ forta klereco kaj supera kapableco, la fratino de mia gastiganto, sin tute donis, kun sia edzo, por la instruo de la simpluloj, kaj kun li, laboris ĉe firmo, fondita de riĉega filantropo, kiu eldonis kaj disvastigis ĉe la malriĉuloj malkarajn libretojn, literaturajn kaj instruantajn.

Kun ŝi ni parolis pri Rusujo, pri ĝia estinto, ĝia nuna stato, konfuza kaj malfacila, kaj pri niaj esperoj je ĝia estonta prospero dank' al racia evolucio per ĉiam progresanta klerigo de la popolo.

Poste ŝi sidiĝis antaŭ la fortepiano kaj ludis al ni ian belan rusan arion. Apogate kontraŭ la kusenoj de mia kanapo, fumante parfumitan rusan cigaredeton, mi profundiĝis en miaj pripensoj, lulata de tiu duonorienta melodio, kiu sin miksis kun la memoraĵoj de nia ĵus finita konversacio. Stranga sento kaptis min. Ŝajnis, ke mi estas tute enpenetrata de tiu rusa atmosfero, kiu min ĉirkaŭis, ke mi iĝas ano de tiu familio, kies ĉiuj pensoj, opinioj kaj vivkondiĉoj estis tiom al mi kutimaj. Kiom malproksimaj, konfuzaj,—eĉ fremdaj!—ŝajnis al mi tiam Francujo, Alĝerio, mia antaŭa pensaro, mia franca "mi"! Penon mi bezonis, por ree konscii mian realan personecon, kaj kun mirego, mi ekmemoris subite, ke mi estas efektive inter fremdaj homoj, kiujn mi konis nur de kelkaj semajnoj, kies nacian lingvon mi ne scias tiel, kiel ili ne scias la mian, ke inter ni sola ligilo kaj komunikilo estas nur artefarita lingvo!

V.

Dum mia ĉeestado en Sumi, mi faris en la ĉirkaŭajn vilaĝojn multajn ekskursojn kaj ĉie ricevis, dank' al mia amiko, tre koran akcepton. Priskribi ĉiujn ilin detale, estus tro longe kaj, fine, enuige por miaj legantoj. Mi rakontos, kiel ekzemplon, nur unu el tiuj vojaĝetoj.

Ian tagon, s-ro Speranskij kaj mi decidis, ke la morgaŭan tagon, ni veturos frumatene per poŝta veturilo, en Olŝanka'n, malproksiman je 20 verstoj, ĉe lian amikon s-ro Lintvarev, kie ni pasigos du tagojn, por ke mi konatiĝu kun la kampara vivado.

Je la tagiĝo malforta frapeto kontraŭ la ekstera vitro de mia duobla fenestro vekis min. Mi saltis el mia ferliteto, forpuŝis la noktan kurtenon de la fenestro kaj vidis, en la korto, la "jamŝĉik'on" aŭ poŝtan veturigiston, kiu tiel anoncis, ke li nin atendas.

Ni vestiĝis kaj matenmanĝis senbrue por ne malkvietigi la dormantaron de nia domo, kaj baldaŭ, komforte sidantaj en nia poŝta kaleŝo, ni fiere ruliĝis sur la pintaj pavimoj de l' stratoj de Sumi, per la tuta rapidpovo de niaj bonaj ĉevaloj, kiel decas por

veturilo de jamŝĉiko, honordevigata montri sian superecon antaŭ la modestaj trapasantaj, "izvoŝĉiki" (urbaj veturigistoj) aŭ la muĵikoj, kondukantaj en la bazaron siajn ĉaretojn, plenajn da lignaĵo aŭ da legomoj. Kaj, efektive, tute bravula ŝajnis nia fiera jamŝĉiko, kun sia bela ruĝa ĉemizo, sia ĉapo, ornamata per pavplumo, dum li stimulis siajn ĉevalojn per amemaj vortoj:

—Nno, parencinoj! Nno, bravuloj! Plejrapidu, miaj kolombetoj!

Kaj la tintiloj de la jungiloj gaje kantetas, dum ni rapide trapasas la lastajn dometojn de la urbo. Niaj "parencinoj" estas fortikaj, la risortoj de nia veturilo bonegaj, kaj tio estas bonŝanca, ĉar la kavoj ne mankas sur la rusaj vojoj. Ŝajnas, ke la administracio lasas al la veturiloj la taskon ilin ebenigi per siaj radoj; ĝia rolo konsistas nur starigi, dekstre kaj maldekstre, du vicojn de lignaj fostetoj por montri la vojdirekton, kiam "avo-frosto" kovras ĉion, vojojn kaj kampojn, per sendiferenca mantelo de neĝo.

Bedaŭrinde, nun ne estas neĝo, sed abomena polvego de tiu senŝtona nigratero de Ukrajno, kiu polviĝas, kiam ĝi ne ŝlimiĝas. Mi tiam komprenas, pro kio viroj, virinoj kaj infanoj, ĉiuj tie uzas botojn: ĉu pro la neĝo, ĉu pro la koto, ĉu pro la polvo, kie la piedoj enŝoviĝas ĝis la maleoloj, aliaj ŝuoj ne estas uzeblaj!

Nun ni trairas kun multaj skuoj deklivan vojon tra la suburba vilaĝeto Luka, kies loĝantoj preskaŭ ĉiuj laboras en la fabrikejo de Ĥaritonenko. Antaŭ nia rapida veturilo kune kun nigraj porketoj kaj preskaŭ tiom malpuraj, fervore deflankiĝas ĉifonvestataj buboj, kiuj faras al ni respektajn reverencojn kaj petas moneron per akra voĉo.

Post la vilaĝo, la vojo alflankiĝas la riveron Psjol'on kaj poste trapasas ĝin per ligna ponteto apud akvomuelilo.

Tie, nia jamŝĉiko haltas kaj mia amiko petas min foriri de la veturilo.

—Kial?—mi demandas surprize.

—Ĉar la ponteto estas iom malnova kaj ŝanceliĝema, pli singarde estas pasi sur ĝi piedire sen la veturilo, kiu reatingos nin poste.

Efektive, multaj plankoj de tiu ponto estas putrintaj, kaj mi tre timas ke, malgraŭ la traboj, enŝovataj kontraŭflue por ŝirmi ĝin kontraŭ la printempa glaciflosaĵo, la glacirompiĝo forportos la tutan lignaĵaron! Cetere, tio eble estus bona, devigante la registaron fari novan ponton!

Sur la alia bordo estas herboplena marĉo, kiun ni povas traveturi dank' al masonita ŝoseo. Kiel la registaro povis fari tiun proporcie multekostan konstruaĵon, kiam ĝi ne

povas eĉ ripari lignan ponteton? Mia amiko klarigis tiun misteron, respondante min, ke la ŝoseo estas konstruita de privatulo.

Ĉirkaŭ ni, inter kanaroj, plaŭdnaĝas diversaj akvobirdoj, precipe anseroj kaj anasoj, kaj eĉ, en tiu ŝlima akvo, petolas kaj sin banas kelkaj nudaj buboj. Sed la marĉo ne estas vasta, kaj baldaŭ ni veturas en la ukrajna stepo.

Jam la ruĝa suno tute leviĝis super la horizonto kaj, tra flokaro de blankaj nubetoj, disŝutas heligajn kaj varmigajn radiojn sur la kamparon, kiu disvastiĝas ondolinie ĝis nevideblejo. Nur maloftaj arboj, poploj aŭ betuloj, kaj, iafoje, ventomuelilo, kies flugiloj turniĝas per la venteto de la stepoj, rompas la uniformecon de tiu senfina ondoforma ebenaĵego. Oni ne renkontas tie, kiel en niaj okcidentaj landoj, dometojn dise konstruatajn apud tufo de arboj: la kamparanoj rusaj malŝatas esti izolaj kaj ĉiam sin grupigas po vilaĝoj.

La naturo estas frumaturiga en Rusujo. Oni semas tuj post la printempiĝo, t. e. dum la dua duono de marto, kaj nun, en la komenco de julio, la fojno jam estas falĉita. Oni rikoltas sekalon, avenon kaj tritikon, kiujn oni superŝutos sur la vendejon Eŭropan. Ukrajno kaj Nordameriko estas la du provizejoj de Eŭropo por tritiko. La nigra tero de suda Rusujo estas ankoraŭ nova kaj tre fruktodona; racie dividata, ĝi certigus sufiĉan vivrimedon al ĝia tuta loĝantaro. Bedaŭrinde granda parto de ĝi estas posedata de riĉegaj bienhavantoj, kaj la neklereco de la muĵikoj, kiuj posedas la ceteron igas ilin tro facile viktimoj de la rikoltaĉetistoj. Tiuj spekulaciistoj, profitante la malriĉecon de siaj vendistoj, konsentas al ili malsimplajn antaŭajn pruntedonojn, per kiuj ili tiel konfuzigas siajn kalkulojn, ke la kompatinduloj ne povas ilin kontroli. Plejofte, ili ne scias legi kaj skribi, kaj devas konfidi al la vilaĝa skribisto, kiu interkonsentas kun la aĉetanto, por ilin perfidi. Tiel, ĉu posedate de bienuloj, ĉu ekspluatate de la muĵikoj, la rusa tero tro ofte utilas nur por pliriĉigi malmultajn anstataŭ doni facilan vivadon al tiuj, kiuj ĝin efektive fruktigas.

Tion klarigis al mi s-ro Speranskij; kaj mi rigardis trapaŝantajn, la longajn sekvantarojn de malaltaj ĉaretoj, kiujn tiris malrapide paroj de pripensemaj bovoj, dum sur la flavaj amasigitaj fasketoj la kondukantoj apatie sterniĝis.

—Simbola apatio de tiuj simpluloj, mi rimarkigis. Kiom longe ĝi daŭrados, kaj ĉu ne danĝera estos la vekiĝo?

—Neniu povas ĝin diri,—respondis mia amiko.—Tamen, eĉ nun, estas notinda antaŭsigneto. Rimarku, ke multaj el tiuj muĵikoj, vidinte mian uniformon, ne salutas: antaŭ kelkaj jaroj, tio ne estus okazinta, kaj tio pruvas internan malkontenton, kiu eble kaŭzos al ni surprizojn.

Tiel parolante, ni estis alveturantaj apud la vilaĝego Ĉernečina, de kiu nin disigis nur rivereto trairebla per ligna ponteto. Sed tiu ponteto, pli malfeliĉa ol tiu de Luka, jam estis tute disrompita kaj pacience atendis, ke oni bonvolos ĝin ripari. Ĉar ni ne povis, ankaŭ, atendi tiun bonvolon, ni faris kiel la loĝantoj de Ĉernečina, ni ĉirkaŭiris la rivereton ĝis alia ponteto. Tio prokrastigis nin je dudek minutoj, sed, en Rusujo, "time is not money".

La vilaĝegon tiam ni ne vizitis, kaj ni haltis nur momente, por trinkigi niajn spiregantajn "parencinojn". Junulino, vestita pentrinde per ruĝebrodita ĉemizo ĉerpis akvon el puto, fosita en la strato mem kaj ŝirmata per tegmenteto kun sankta ikono. Nia veturigisto, pie sin signis kruce antaŭ la ikono, kaj petis de la nova Rebekka unu sitelon da akvo, kiun li pagis, ne per biblia edziĝpropono, sed pli moderne, per kelkaj moneroj.

Kaj poste, "nno kolombetoj"! Nia kaleŝo ree rapidis sur la polvoplena stepo. Post kelkaj verstoj, la aspekto de la pejzaĝo ŝanĝiĝis, ĉar ni alproksimiĝis la provincon Kursk, mezan inter Malgranda kaj Granda Rusujo. La kamparo iĝis pli malebena, la arboj pli oftaj. Fine, nia vojo torde disvolviĝis inter kruta deklivo, kiun arbareto kronis, kaj la profunde fosita fluejo de la rivero Psjol, tie proksima de sia fonto, kaj iĝanta nun modesta rivereto.

Sur teraltaĵeto juna kamparano, helpata de amiko, konstruis lignan dometon. S-ro Speranskij salutis lin per gaja ekkrio, kiun li afable respondis.

—Mi amikiĝis,—klarigis mia amiko, kun tiu tre saĝa kaj iom klera muĵiko. Mitrofano ĵus fianĉiĝis, kaj, kiel kutime, konstruas sian edziĝan neston antaŭ ol preni edzinon. Ni vizitos lin poste ĉe liaj gepatroj kaj petos, ke li montru al vi vilaĝajn dancistojn.

Nia vojaĝo estis finiĝanta. Ree stimulataj per la karesoj de l' vipo kaj de l' amemaj vortetoj de nia jamŝĉiko, niaj bonegaj "parencinoj" triumfe galopis en larĝa aleo, borderata per palisoj plektitaj el salikaĵoj, kaj vico de pentrindaj dometoj. Ni alveturis antaŭ barilo, kiun servisto malfermis, ni eniris en vastan korton, kiun ĉirkaŭis veturilejoj, ĉevalaj, bovaj kaj ŝafaj staloj kun la tuta ilarejo, necesa por ekspluati grandan bienon. Poste aperis ĝardeno, kiun ombris altkreskaj arboj. Bela hundego nin akompanis per laŭtaj bojoj. Fine, nia veturilo haltis antaŭ la verando de domo, gracie kovrata de foliaroj. Tie min atendis la mastroj de tiu bieno, s-ino Lintvareva kaj ŝia filo.

Kiel multaj bienuloj de Rusujo, s-ro Lintvarev ofte vojaĝis kaj povas iom paroli per ĉiuj ĉefaj lingvoj de Eŭropo. Mi do povis senpere babili kun mia nova gastiganto, kies bonhumoreco kaj afabla akcepto tuj faciligis min. Laŭ la bela rusa kutimo, li diris al mi:

—Bonvolu konsideri tiun domon, kiel vian, kaj kondutu tutlibere, kiel en via hejmo!

Kaj li akompanis min en la bieno por konigi ĝin al mi. La domo staras kontraŭ lageto, kiun oni povas vidi el posta verando. Ĉirkaŭe estas la floraj, fruktaj kaj legomaj ĝardenoj, kaj, pli malproksime, la kulturejo, kiu etendiĝas al la nordo, inter beletaj altaĵetoj ĉe la limo de la gubernio Kursk. Je la maldekstra flanko de la domo, apud herbejo, ombrata de belegaj arbegoj, densa arbareto kuŝas sur plataĵeto, kiu antaŭeniras kiel promontoro kaj permesas ĝui ĉirkaŭvidon super la steparo. Kiom majeste impresiga devas esti tiu panoramo, kiam la norda vintro kovras la senfinan ebenaĵegon per uniforma tapiŝo de neĝo, blindige brilanta sub la radianta suno! Tiam la tuta naturo silentas kaj ŝajnas mortinta sub tiu glaciiga kovrilo. Nur maloftaj glitveturiloj kaj malsataj lupoj iafoje punktemarkas la blankaĵon, solaj atestantoj de la vivo, interne kaŝata.—Nun, kontraŭe, kia vivpotenco ĉirkaŭas min! Miaj piedoj premas flekseblan herbon kaj disŝutitajn en ĝi graciajn floretojn, kiujn ondigas la stepa venteto. Tie svarmas la multego de la insektaro, formikoj kaj laboremaj abeloj, zumantaj muŝoj, kaj, ho ve! suĉemaj kuloj, ŝajnantaj kredi, kiel simplaj homoj, ke la mondon oni fabrikis speciale por ili, kaj ke ili rajtas profiti mian sangon, kiel mi la lakton de bovinoj. En la foliaroj de la arbareto malantaŭ staranta, la birdaro pepas, flirtas kaj batalas, dum ĉirkaŭ mi kvietaj brutoj dormetas aŭ sin paŝtas laŭ meditema malrapideco. La apudeston de l' homoj oni divenas nur per iliaj faritaĵoj, kampoj ĵus falĉitaj kaj dometoj, tegmentitaj per pajlo, sed en tiu horo, ĉiuj, viroj kaj virinoj, estas okupataj pri la draŝado, kiun konigas la basa ronkado de nevidebla maŝino.

Post ĝenerala esplorado de la ĉirkaŭaĵoj, ni vizitis la domareton de la muĵikoj. Antaŭ kvardek jaroj, kiam ekzistis la servuteco, oni kalkulis la valoron de ĉiu bieno, ne per la nombro de ĝiaj "desjatini" (termezuroj), sed per tiu de la "animoj", t. e. de l' servutuloj, kiuj ĝin kulturis. Periodaj enrigistroj kontrolis la nombron de tiuj animoj kaj per ĝi determinis la impostŝuldon de l' bieno. La muĵiko valorigis la bienon ne nur ĉar li donis al la mastro terlaboron, sed ankaŭ ĉar li devis pagi al li specialan takson, nomatan "obrok", diversvaloran laŭ la pagebleco de l' muĵiko kaj la bezonoj de l' sinjoro; li ne povis forlasi la bienon aŭ edziĝi sen la permeso de lia posedanto. Hodiaŭ, liberigita per la leĝo, la muĵiko memposedas sian dometon kaj iom da tero; kaj, ĉar tiu bieneto ne sufiĉus por nutri lian familion, li dungekulturas la bienon de la sinjoro. La elservutigo ne faris praktike gravan plibonigon en lia stato, ĉar se ĝi malebligis la trouzojn de la landestro kontraŭ la landservutulo, aliparte, ĝi lasis la nekleran kamparanon sen protektado kontraŭ la malhonestaj spekulaciistoj, kiuj nun lin trompas.

Feliĉe, inter la landsinjoroj estas liberalaj homoj, kiuj donas volonte al sia eksservutularo neprofitemajn konsilojn kaj kvazaŭ patriarkan protektadon. Rekompence, la muĵikoj ne ĉesis montri antaŭ ili tradician respekton, kiu donas al iliaj kunrilatoj fizionomion apartan kaj kuriozan. Cetere ĉiuj kleruloj de Rusujo, eĉ la plej

entuziasmaj pri la muĵikoj (kaj en tiu nacio dank' al Tolstoj ili estas multegaj) uzas por ilin alparoli tonon duonrideman, duonprotekteman kiel, ĉe ni, plenaĝulo parolas al knabo. Ja tiu konduto estas prava, ĉar la rusa kamparanaro, kiu ĝis nun ne disvolviĝis intelekte, estas kvazaŭ knabaro, knabaro multnombra, en kiu sidas la fatalo de tiu nacio, promesdona aŭ minacplena laŭ la direkto, kiun elektos ilia nuna evolucio. Tion bone komprenis la adorato de la rusaj kleruloj, grafo Leo Tolstoj, kiam, decidinte dediĉi sin al la edukado de la simpluloj, li malgrandigis sian tutmonde faman talenton de verkisto ĝis la intelekta kreskiĝo de la muĵikoj, por skribi de tiam nur tiujn infanindajn fabelojn, kiuj mirigas kaj elravigas lian fremdan legantaron. Simile al Tolstoj, agas ankaŭ multaj rusaj kleruloj kaj siaflanke la kamparanoj respondas ilin per duonnaiva, duonfidema rideto, kiu strange kontrastas kun ilia esplorema kaj ironia rigardo.

—Kio reale estas en tiuj krudaj cerboj, mi pensis dum kelkaj muĵikoj renkontante nin, salutis s-ron Lintvarev, ĉu tio ĉi estas veraj danko kaj respekto por bona kaj favorema patrono aŭ, ĉu, kontraŭe, sekreta envio de malfortulo al fortulo, kaj la praava malamo de la idoj de l' subpremitoj kontraŭ la ido de l' subpremintoj? Tion montros la estonto.

Miaj gastigantoj, sincere liberalaj, sin montris tiam tre konfidemaj kaj entuziasmaj kaj al mi ŝajnas, ke ili opiniis min iom tro skeptikema kaj moderema. Ilia bela entuziasmo tute memorigis al mi tiun de la franca nobelularo samtempa je Voltaire kaj J. J. Rousseau. Sed nun, la rusaj nobeloj ankaŭ havas sian postrevolucian eksperimenton, kaj, iafoje, mi demandas min, ĉu miaj gastigantoj ne ŝanĝis iomete sian opinion?

Mi memoras plezure niajn paroladojn dum la tagaj kaj vesperaj manĝadoj, kiujn lerte prezidis nia dommastrino. Mi ankoraŭ vidas kvazaŭ antaŭ miaj okuloj, ŝian altan kaj elegantan figuron, ŝian vizaĝon espriman kaj spritan, kaj tiun penetreman rigardon, kiu estus konfuziga, se ne ĝin dolĉigus bonema duonrideto. Ŝi ne povis, aŭ, pli ĝustedire, ne konsentis paroli france kaj mi devis, por niaj konversacioj, uzi la peron de ŝia filo aŭ de mia amiko. Sed ŝi perfekte konis nian nunan francan literaturon,—multe pli bone, o ve! ol mi mem konis la rusan,—kaj ŝi sin montris fervora admirantino de Emile Zola. Tiu franca aŭtoro estas la preferato de la rusaj legantoj, kiel plej simila, per sia verkmaniero, je la nun iom kruda realismeco de la slava verkistaro.

—Volonte mi konsentas kun vi,—mi diris,—pri la potenco de observadisto kaj de priskribisto de Zola. Liaj romanoj iafoje altiĝis, per la forto de la vereco kaj de la vivpoveco ĝis la beleco de moderna epopeo, sed, pro ĝia talento mem mi bedaŭras, ke tro sisteme li montras la malbonajn flankojn de nia homaro. Tiel farante, li iĝis iom malvera, same kiel estus fiziologiisto, kiu, por montri, kia estas la homa korpo, prenus siajn ekzemplojn nur en malsanulejo. Pro tio mi timas, ke vi, sinjorino, kaj la multaj

estimindaj fremduloj, kiuj legas liajn priskribojn, havu pri nia franca societo malfavoran, kaj, mi povas diri, ne pravan opinion.

—Vera respondo de francoj, ĉiam ĝentilaj kaj fieraj, neniam seriozaj! Sed kvietigu, sinjoro franco, vian nacian ofendemecon!—respondis kun bona rido s-ino Lintvareva.—Ni ne opinias, ke Zola montras la malvirtojn de l' francoj, sed tiun de l' homoj, kia ajn estas ilia nacieco. Ĉiuj homoj estas samvaloraj, francoj aŭ rusoj, riĉuloj aŭ malriĉuloj, nobeloj aŭ muĵikoj. La verkaro de Zola estas la spegulaĵo ne de unu nacio, sed de la tuta homaro.

—Estu tio, mi diris. Sed ĉu talenta verkisto ne devas celi la animan pliboniĝon de sia legantaro kaj, por tio, montri en siaj libroj imitindajn ekzemplojn prefere ol malestimindajn homojn?

—Jes, se li verkas por infanoj, ne, se li sin turnas al prudentaj homoj. La plejbona instruado por plenaĝaj homoj rezultas el la sperto mem de la vivo, kaj el ĝia tute sincera priskribo, tia kia ĝi estas. Malprave oni supozus, ke vero bezonas artornamon, ian idealan poeziigon. Impresiga estas nur la vivo kruda. Via Zola, nia Gorkij kaj nia Tolstoj pli multe faris por la plibonigo de l' homaro, ol centoj de moralaj kaj religiaj libroj!

Tiel parolis, per forta kaj konvinkata voĉo tiu nobelino, forspirante al la plafono la blankajn fumrondetojn de la bonodoraj cigaredoj, kiujn, kiel multaj rusinoj, ŝi fumadis dum la tuta tago. Kaj dume, super ŝia kapo, en angulo de la manĝoĉambro, trankvile briletis lumeto pie pendigita antaŭ la sankta ikono, eksprotektanto de tiu domo, nun lasta postsigno de la tempo, apenaŭ pasinta, kiam la nobeloj ne legis Zola kaj posedis servutulojn!

Tiun saman kontraston mi konstatis, dum la sama vespero, kiam mi eniris en mian dormoĉambron. Vitrata ŝranko montris aron de sanktaj figuroj kaj piaj aĵetoj, arkaisme kolorigitaj. Sed, sur antaŭmetita breto, amasiĝis libretoj de popola eldonejo, kiu celas disvastigi la modernan klerecon ĉe la muĵikoj kaj laboristoj!

VI.

La postan tagon, je mia vekiĝo, s-ro Speranskij proponis al mi matenan promenon en la bieno de s-ro Lintvarev. Mi plezure akceptis. Nin akompanis dekdujara gimnaziano, Kolja (Nikolĉjo), jam fervora adepto de l' sporto, kiun sankta Huberto plejŝatis, kaj armata per malmultpeza karabeno por pafi al la birdoj. Pri tio mi devas diri, ke Rusujo estas paradizo por ĉasistoj pro la multego kaj diverseco de ĝia ĉasaĵo, kaj s-ro Lintvarev estis proponinta al mi interesajn kaj fruktoplenajn ĉasesplorojn. Bedaŭrinde

mi, kiel s-ro Speranskij, tute ne ŝatas tiun plezuron. Mi, do, min armis nur per mia fotografilo por kapti kalkajn kuriozajn pejzaĝojn.

Ni intencis viziti la kamparon, sidantan transe de la lageto, kaj por atingi pli rapide nian celon, ni decidis veturi tien per boato. Apud la bordo estis ia stranga ŝipeto, nomata ruse *botik* kaj tre simple fabrikita de la muĵikoj el unu arbotrunko. Tiuj pirogoj, mallarĝaj, cilindraj kaj, kompreneble, sen kilo, renversiĝas tiom facile kiom ili moviĝas, kaj mia amiko antaŭsciigis min afable, ke ia ajn skueto nepre nin ĵetus en la akvon!

Tiel bone informita, mi singarde lokis min kaj mian fotografilon en la mezon de tiu ĉarma boateto, sur ĝian fundon mem, ĉar benkoj estas superfluaĵo, malŝatata de l' muĵikoj. Kolja sin starigis, kiel koko, sur l' antaŭan pinton de nia flostrunko, dum s-ro Speranskij, kiel ŝipestro, grave sin metis sur la postan parton kaj lerte nin puŝis per mallonga tabuleto, kiun li bonvolis nomi remilo. Tiel, oni diras, la muĵikoj veturas komforte: ke mi sentis min komforte, mi ne povus certe diri, sed tiu sporto donis al mi ne atenditan senton, tiun de la dancisto sur streĉita ŝnuro! Nur mi forte bedaŭris, ke mi ne akceptis la pafilon, proponitan de s-ro Lintvarev, ĉar ĝi estus al mi oportune utilinta kiel ekvilibrilo!

Ni malrapide veturis sur tiu lageto, kiun ĉirkaŭis kaj ornamis la densa foliaro de belaj arboj. En ia loko, tiu lageto estis superakviginta malaltan parton de la bordo kaj ni devis antaŭeniri singarde, meze de la ŝtiparo de renversitaj kaj senfoliigitaj arboj, kiuj donis pentrindan ŝajnon al la pejzaĝo, sed estis, pro siaj subakvaj radikoj, danĝeraj rifoj por nia turniĝema ŝipeto. Multaj duonsovaĝaj anasoj naĝis ĉiuflanke, rapidante for de ni kaj de nia bruema karabeno. Nia juna ĉasisto fervore celis, pafis kaj maltrafis. Tamen, iafoje, nesingarda birdo restis proksime de ĝia malamiko.

—Ho! tiun ĉi fojon, mi nepre ĝin trafos! ekkriis Kolja.

Kaj li alŝultrigis zorge sian karabenon, vigle premis la risorton, por celi pli precize kliniĝis al la birdo, kaj... ni triope defalis en la akvon!

Feliĉe, neprofunda estis la lageto, kaj proksima ĝia bordo. Akvumitaj, ŝlimaj kaj malvarmaj, ni maltriumfe reiris domen, akompanataj de la nazsonaj kondolencoj de la anasaro.

Post plena puriĝo, viŝiĝo, revestiĝo kaj bona manĝado, kiu revarmigis nin, s-ro Lintvarev proponis al ni viziti la vilaĝon Ĉerneĉina, tra kiu ni jam estis veturintaj dum nia alvena vojaĝo. Por konatigi min kun la kampara veturilaro, ni tien iris per "bjegunki". La plej kutima veturilo muĵika estas la "linjejka", kiu konsistas el simpla trabo kun kvar radoj, sur kiu oni rajdas apogante siajn piedojn sur l' antaŭan radakson.

Sed la bjegunki de s-ro Lintvarev estis pli luksa. Anstataŭ trabo, ĝi havis rektangulan plankon, sur kiu ses homoj povis sidi dorso ĉe dorso. Nek risortoj, nek apogiloj, sed la veturantoj povis tute libere sin apogi kontraŭ pli firma kunvojaĝanto aŭ sin alkroĉi je lia vesto, kiam la skuegoj estis tro fortaj, kaj se nur ili atentis zorge por ne tuŝi la teron per siaj pendantaj piedoj, ili entute povis sukcese atingi la finon de sia vojaĝo.

Mia boatpromeno estis jam iginta min lerta ekvilibristo, tial mi estis ankoraŭ tuta kaj sana, kiel efektiva muĵiko, kiam ni haltis en la vilaĝo Ĉerneĉina, antaŭ la domo de lia pastra moŝto, patro Vasilij. Tri belaj geknaboj ĝoje nin akceptis kaj rapidis por saluti s-ron Lintvarev, dum aperis la edzino kaj la bofratino de l' pastro, fine la pastro mem, kies alta figuro, belŝajna vizaĝo kaj saĝa rigardo tuj elvokis simpation.

Patro Vasilij diferenciĝas el multaj siaj kolegoj per sia larĝa kaj moderna spirito. Dece kaj afable li ricevis la neortodoksan fremdulon, kia mi estis, anstataŭ manifesti la malprogreseman malfidon, kiun montras kutime al la fremduloj la ekleziularo vilaĝa. Aliparte, patro Vasilij, kiel ĉiuj rusoj, pasie amas siajn infanojn, kaj, ĉar mi mem estas ĉiam favoratulo de la geknabaro, mi tuj eltrovis la vojon al lia koro, amikiĝante kun liaj ĉarmaj gefiloj, kiuj baldaŭ alportis al mi, en la salonon, la tutan kolekton de iliaj ludiloj. Sub ilia protektado mi inspektis la pastran domon, beletan lignan konstruaĵon, starantan antaŭ la preĝejo, ĝian ĝardenon kaj ĝian korton, eĉ la fortegan virporkon, patron de la tuta porkidaro de Ĉerneĉina, fonton de fiereco kaj de profitoj por la pastra familio.

Poste mi vizitis kun patro Vasilij la preĝejon de l' vilaĝo, kiu tiam estis dezerta, ĉar la tuta loĝantaro sin okupadis pri kampara laboro. Tre simpla estis tiu preĝejo, konstruita, laŭ rusa kutimo, meze de ĝardeno, ĉirkaŭita de muroj en kies parto estis la tombejo de la vilaĝanoj. Kiel ĉiuj ortodoksaj preĝejoj, ĝi estis kvadrata, kun kvar flankaj kaj unu centra kupoloj verde pentritaj. Ĝian internon dividis je du partoj mezstaranta muro aŭ ikonostaso, post kiu estis la loko, rezervata por la pastroj kaj iliaj helpantoj. En la rusaj preĝejoj estas nek seĝoj,—oni devas pied- aŭ genustari,—nek orgenoj,—nur la homa voĉo estas permesata de la ortodoksa liturgio,—nek statuoj, sed multnombraj muraj pentraĵoj, figurantaj la Tridion kaj la ortodoksajn sanktulojn, sed tiuj pentraĵoj neniel celas simili la realaĵon—ĉia persono, kvazaŭ katalepsiigata en sintenado, fiksita de la tradicio, vestata per rigidaj bizante kolorigitaj kaj orumitaj vestaĵoj, memorigas la bildojn de la Mezepokaj manuskriptoj. Antaŭ la ikonostaso staras malalta katedro, el kiu la pastro alparolas la aŭskultantaron. La altaro staras post la ikonostaso en la parto, difinata por la ekleziularo. Oni tien iras tra tri pordoj, el kiuj la centra estas trairebla nur de la diservanta pastro kaj de la caro, dum la tago de lia kroniĝo. En tiu pordo pendas vualo, memoriganta tiun de l' Templo en Jeruŝalajmo, kiun oni mallevas por kaŝi la pastron, dum li komuniiĝas.

De la centra kupolo, kie estas la sonorilejo, mi povis ĝui ĉirkaŭvidon sur la tutan vilaĝegon. Tre apartan kaj pentrindan vidiĝon havas la malgrandarusaj vilaĝoj. Male je la malpuregaj "isbi" de Grandarusujo, iliaj dometoj aŭ "ĥati" ĉiam estas zorge purigitaj kaj freŝe kolorigitaj per kalko. Iafoje la malgrandaruso, kiu havas artistan instinkton, pentras blue aŭ rozkolore sian "ĥata", kaj tiuj diverskoloraj dometoj ŝajnas ludiloj de infanoj pro siaj pordoj kaj malgrandaj fenestretoj, ornamitaj per lignaj skulptaĵetoj. Ĝenerale la dometo staras gracie en ĝardeneto, ĉirkaŭata de barilo el plektitaj salikoj, kaj gajigata de papavoj, siringoj, precipe de lakmusoj kun larĝaj, vivflavaj floregoj. Kiam tiuj sunfloregoj plene maturiĝis, la muĵiko detranĉas ilin kaj sekigas sur la malalta pajla tegmento de sia ĥata tiel ŝanĝata je bukedo; poste, de la sekigitaj floroj li forprenas la centrajn nigrajn grajnojn, kiujn li tre frandas. Somere, la lipetoj de la vilaĝaj geknaboj estas ĉiam nigrigataj de tiuj grajnoj, kiujn ili senĉese mordetas.

Patro Vasilij kondukis min ĉe kelkajn ĥati'n. Ilia plano estas tre simpla—unu peroneto, unu malgranda antaŭĉambro por la brutaro, kaj unu kvarangula kalkepentrata ĉambro, kun lignaj benkoj, fiksataj kontraŭ la muroj kaj unu tablo. En unu angulo, kubforma forno senĉese hejtata dum la vintro; en la kontraŭa angulo, sankta ikono, ĉirkaŭata de diversaj kolorigitaj bildoj, figurantaj la sanktulojn, la caran familion, vidaĵojn de Moskvo, de sanktaj monaĥejoj, aŭ popolajn legendojn kaj kantojn. Se la mastro estas riĉeta kaj luksama, li ornamas sian plafonon per girlandoj el diverskoloraj paperoj, kiuj tute similas tiujn de la maŭraj domoj en Alĝerio. En la ĥati ne estas litoj—la muĵikoj sin kuŝas sur la benkojn, kaj, vintre, kontraŭ la forno.

Tiaj dometoj, faritaj el tero, lignaĵo kaj pajlo, facile kaj tre ofte ekbruliĝas. Tial la registaro prave devigas la kamparanojn asekuri liajn domojn kontraŭ la fajro. Kiam brulado okazas, tuj la preĝeja sonorilego ĝin anoncas, kaj ĉiuj devas helpi por la estingo. Ĉiu havas rolon antaŭ difinitan kaj devas alporti la ilon, sitelon, hakilon, k.t.p., kiun montras desegnaĵo, farita super la pordo de lia dometo. Cetere la bruligo de tiuj senmeblaj "ĥati" ne estas tre grava malfeliĉo, se nur la posedanto povas antaŭe savi siajn brutojn kaj malmultan ilaron. Nova loĝejo estas rapide konstruata, la domaĝon pagas la asekura kompensaĵo kaj la fina rezultato estas, ke la muĵiko anstataŭis malnovan dometon per nova.

Kiel mi jam diris, la vilaĝanoj laboris en la kamparo, kaj nur restis en Ĉernečina junaj infanoj, kiujn ni vizitis en la infangardejo apud la preĝejo. Por ili, s-ro Lintvarev estis alportinta kuketojn, per kiuj ni feliĉigis tiujn malriĉajn hometojn post la disdono de ilia supo. Sed la vido de l' plezuriga apetito de tiuj geknabetoj apetitigis nin mem kaj volonte ni reiris en la domon de patro Vasilij, kie nin atendis sufiĉega manĝado.

Post mallonga preĝeto, nia afabla gastiganto plenigis glasetojn da brando kaj solene toastis je nia sano; poste, ni sidiĝis ĉirkaŭ la tablo. Por miaj nerusaj legantoj mi donas

la liston de la manĝaĵoj. Unue, en vasta pladego "botvinjo", t. e. fumigitaj kaj nekuiritaj fiŝoj, haringoj kaj anĉovoj, kun duonboligitaj kaj senŝeligitaj ovoj, naĝantaj en kvaso, aŭ cidro, farita el fermentita sekalpano[3]; due "barĉo" aŭ bolita viandaĵo, fine rostita bovaĵo; kiel deserto, framboj kun kremo, akvomelonoj kaj pomoj.

[3] Eble miaj legantinoj deziras scii la formulon por fari bongustan kvason? (tiu trinkaĵo havas tre malsimilajn gustojn laŭ ĝia farmaniero).

Prenu unu kilogramon de bakita sekalpano; ĝin tranĉu laŭ pecoj larĝaj kiel manplato; ilin sekigu en forno aŭ sur fera plataĵo. Poste, metu ilin en vazon kaj surverŝu proksimume du litrojn da bolanta akvo. Kovru per tuko kaj atentu, ĝis kiam tiu miksaĵo atingos nur 20, 25 gradojn de la centigrada termometro. Tiam almetu dudek kubajn milimetrojn da fermentilo (prefere biera fermentilo). Lasu la tuton fermentadi dum dekdu horoj. Poste filtru la fluidaĵon, almetu 150 gramojn da sukerpulvoro, kaj miksu, por ke ĝi plene solviĝu. Enverŝu la fluidaĵon en du, tri botelojn kun *du* sekaj vinberoj en ĉia botelo; hermetike kaj fortike ŝtopu, kaj starigu la botelojn en *malvarman* lokon. Post 4, 5 tagoj, la kvaso estos farata.

Mi atentigas miajn legantinojn pri tio, ke la kvaso, kiel la ĉampanvino, devige postulas malvarmon, eksplodas kaj ŝaŭmas. La formulo supredirita havigos 2, 3 botelojn. Kompreneble, por havi pli grandan kvanton, plimultigu proporcie la kvantojn de sekala pano, akvo, fermentilo kaj sekaj vinberoj.

Certe, mi tre mirigis, eble iom skandaletis la bonan pastron, petante por iom da akvo! Por sensoifigi nin, ofte, dum la manĝado, li plenigis niajn glasetojn per brando, leviĝis kaj retoastis je nia sano. Kompreneble, ni devis vice fari al li kaj al lia familio tiun saman ĝentilaĵon. El tio rezultas, ke plaĉinda gajeco jam vivigis nian rondon, kiam la mastrino solene alportis la samovaron. Mi fine kronigis tiun ĝojan kunsidon, fotografante patron Vasilij kun lia familio.

Dum mi skribas tiujn liniojn, mi havas antaŭ miaj okuloj tiun portreton. Patro Vasilij sidas grava, ĉirkaŭata de siaj edzino, bofratino kaj tri graciaj infanoj. Lia bela barbo kaj lia longa kaphararo, kiujn tondilo neniam devas tuŝi, etendas silkbrilajn buklojn sur lian grandfestan violan sutanon; lia plej luksa kruco ornamas lian larĝan bruston. Lia penetrema kaj lojala rigardo elvokas impreson de honesteco, indeco kaj saĝeco. Se nur ĉiuj rusaj pastroj similus lin!

Fine, ni devis lasi tiun simpatiindan familion. Rapide, nia "bjegunki" reveturigis nin ĉe s-ron Lintvarev, ĵus por ke ni povu partopreni en la posttagmeza manĝado. Ho! tiuj rusaj manĝadoj! Apenaŭ unu finiĝis, alia ekkomencas! Mia franca stomako devis energie batali kontraŭ iliaj senĉesaj atakoj. La rusa tago enhavas kvin regulajn manĝadojn: je la vekiĝo, je la dekunua horo matene (zavtrak), je la tria posttagmeze (objed), je la oka vespere (uĵin), kaj la manĝeto aŭ poldnik; plie se vi vizitas iun, nepre oni proponas al vi ian frandaĵon kun teo, kiun la ĝentileco devigas vin akcepti. La malgrandarusoj pretendas, ke ili manĝas malmulte kompare kun la grandarusoj: mia imago, terurigata, rifuzas pripensi, kia povas esti la grandarusa apetito!

Post tiu manĝaĵo, mi iris kun s-ro Speranskij viziti lian amikon, muĵikon Mitrofanon, kiun ni estis jam renkontintaj la antaŭan tagon, dum ni veturis al la bieno de s-ro Lintvarev.

Tre simpla kaj malriĉa estas la domo de l' gepatroj de Mitrofano, sed afablega estis lia akcepto. Krudaj manoj, hardigitaj de l' terlaboro, ĝoje kaj gastame premis la manon de s-ro Speranskij kaj tiun de lia amiko. Ĉiuj, gepatroj, gefratoj, eĉ genajbaroj, junaj kaj maljunaj, amike amasiĝis ĉirkaŭ ni. Sur la malglatan tablon oni alportis botelon da kvaso kun kuketoj, kaj ni toastis kun tiuj bonegaj simpluloj. Mitrofano prezentis al ni sian fianĉinon, kun kiu li estis edziĝonta tuj post la konstruo de ilia dometo.

Mia amiko petis ilin kaj aliajn gejunulojn, ke ili dancu antaŭ mi kelkajn tradiciajn dancadojn, kaj ili afable akceptis. La dancejo estis verda herbejo, ĉirkaŭata de arbetaroj. La orkestro konsistis el akordiono, violono kaj tintiltambureto, sed ĉiuj akompanis voĉe la muzikantojn. Dum la junulinoj gracie kaj kvazaŭ malŝate sin balancis, ĉirkaŭ ili, amindumuloj vetbatalis per ĝentilaĵoj kaj afablaĵoj, tiom fervore, eĉ furioze, kiom iliaj praavaj kozakoj, kiam ili atakis la tatarajn bandojn. Jen, kaŭrante, ili rapidege glitigis siajn piedojn unu post la alia, jen, streĉiĝante kiel risortoj, ili alten saltegis kun akra krio, forĵetante flanken siajn piedojn kaj brakojn, turniĝante kaj rondirante ĉirkaŭ la koketulino, kiu fine favoris ilin per esperiga rideto. Tiun sovaĝan dancadon, nomatan "hopak" strange lumigis la ĵus malaperonta suno, ruĝa kiel la flamego de vasta brulado, kies malaltaj radioj malproksimen etendis la ombrojn de l' dancistoj, donante al iliaj ekscitataj vizaĝoj ŝajnon kvazaŭ eksterhoman...

Baldaŭ, tute noktiĝis; sennombra stelaro trembrilis en la malhela ĉielo, dum pala luno, heligis per malvarma lumo la kamparon. La kamparanaj gejunuloj nin akompanis are ĝis la domo de s-ro Lintvarev, plenigante per siaj kantoj la stelplenan stepon. Malrapide mi paŝadis, meze de tiu antikva ĥoristaro. Al mi ŝajnis, ke mi vivas antaŭ tri mil jaroj, dum la epopea tempo de Iliado, kiam la homoj solene kantis siajn amojn kaj malamojn, siajn simplajn kaj fortajn sentojn de duoncivilizituloj. Ĉar, efektive, la muĵiko estas pli proksima je la homoj de antikva Grekujo ol je ni; pro tio li tute konfuziĝas en la malsimpla retaro de niaj modernaj vivkondiĉoj ĝis tiu momento, kiam li ĝin rompas per furioza perforto de barbarulo. Tiuj mildaj, servemaj kamparistoj povas aliformiĝi je kruelaj sovaĝuloj sub la instigo de forta pasio, kaj ili ĝin montris dum la kamparaj ribeloj de 1906. Aliparte, lian intelekton nebuligas multaj superstiĉoj, kiujn estas danĝere ofendi. Konatulo de s-ro Speranskij, tamen favorato de la muĵikoj, kiuj lin tre estimas kaj amas, iafoje estis viktimo de ilia fanatikeco.

Li estis revenanta rajde el malproksima vilaĝo, kiam la nokto lin kaptis sur la stepo. Li, do, plirapidigis sian bonan ĉevalon, kiu flugis kiel "poŝtakolombeto", ĝin

direktante al vilaĝo de li konata, kiam subite la ĉevalo ektremis, saltis kaj fine haltis kvazaŭ ĝi estus piedfiksata kontraŭ la tero. Vane la rajdisto incitis ĝin sprone kaj voĉe: ĝi ne moviĝis. Kaj en tiu sama momento, ia stranga, nekomprenebla bruo, sovaĝa kriego kaj freneziga sonorado, de flanke alvenanta, ekaŭdiĝis. La malhelan nokton eklumigis torĉoj, kaj ekaperis fantoma sekvantaro. Aro de muĵikinoj alvenis, svingante bastonojn, ferstangojn de forno, ŝovelilojn, forkegojn, batante sur pelvoj, patoj kaj tamburoj. Antaŭ ili, tri junulinoj, tute nudaj, trenis plugilon, per kiu ili faris sulkon...

La rajdisto subite komprenis, kio okazas: tio estis "opaĥivanje" aŭ ĉirkaŭsulkado, superstiĉa ceremonio, konservata de la antaŭkristanaj tempoj. Kiam epizootio detruas la brutaron de vilaĝo, la muĵikoj estas konvinkataj, ke tiun malfeliĉon produktas ia malica kaj danĝera estaĵo. Kontraŭ ĝi la sola defendilo ebla estas sulko, farita ĉirkaŭ la vilaĝo, nokte, de solaj virinoj, per plugilo, trenata de tri nudaj virgulinoj, ĉar tiun magian sulkon ne povas transpasi la malicaĵoj de l' nekonata malamiko. Sed ve al ia ajn virseksulo, homa aŭ besta, kiun renkontas tiuj noktaj plugistinoj! Ili kredas, ke li mem estas la mistera malbonulo, kaj lin ili mortigas senkompate. Tial, ĉiuj viroj de la vilaĝo, antaŭsciigitaj, singarde restas hejme dum la ceremonio.

La rajdisto, do, sciis, kiom danĝera estas lia situacio, kaj li ree provis inciti sian ĉevalon. Vanaj penadoj! La besto, terurigata de l' bruo kaj torĉlumoj, tremis kaj restis haltanta...

La furioza bando alkuris kun frenezaj krioj:

—Jen pesto! Jen pesto! Elbatu ni lin!

Tuj ĉirkaŭate, la malfeliĉa rajdisto ricevis unu teruran bastonfrapon sur sia dorso. Lastfoje kaj malespere, li enpikis siajn spronojn en la flankojn de lia ĉevalo, kiu fine eksaltis, per siaj hufoj renversis kelkajn furiojn kaj forkuris, rapide kiel vento. Tia estis ĝia teruro, ke ĝia kondukanto ne povas ĝin deteni. Post unu versto, rimeno rompiĝis, post la dua, la selo renversiĝis, kaj la rajdisto falis en kavon, kie li restadis sveninta ĝis la mateno, kiam najbaraj bienuloj lin trovis kaj flegis.

Ne malofte okazas similaj aferoj, sed kiam la morto de l' viktimoj alkondukas antaŭ la juĝantaro iliajn mortigintinojn, plej ofte tiuj ĉi estas senkulpigataj, pro nesufiĉaj klereco kaj respondeco. Tia kamparistaro bezonas instruadon tiel forte kiel panon, kaj cetere tion ĝi mem eksentas. Kiel mi jam diris, multaj homoj kaj multaj privataj institucioj celas tiun noblan taskon de la popola klerigo. Plejmultaj kleruloj de la meza klaso estas tre favoraj al tiu entrepreno. Sed la registaro ĝin rigardas malkonfide kaj ofte ĝin malhelpas. Tamen en lando, kie la naŭ dekonoj de la loĝantaro konsistas el

kamparanoj, ĉu la kleriĝo de tiu multego ne estas la necesa kondiĉo de evolucio kaj pliboniĝo?

La postan matenon, ni reveturis en Sumi'n. S-ro Lintvarev mem bonvolis rekonduki nin, kaj por restarigi en mia spirito la reputacion de la rusa veturilaro, li uzis sian *trojka'n*. Tiu vorto ne signifas, kiel oni povus supozi, specialan veturilon, sed "ĉevaltrion". Tiuj tri ĉevaloj estas jungataj flanko ĉe flanko, la centrulo inter la ambaŭ flanktimonoj sub alta "duga" aŭ ligna arkaĵo, kiu sonoretas ĝoje per multaj tintiloj; la flankuloj, jungataj nur per rimenoj, kvazaŭ libere galopas ondigante siajn multnombrajn helkolorajn ornamaĵojn. Estis vere bela spektaklo vidi tiujn graciajn kaj fortajn bestojn kuregi tra la stepo. La komforta kaleŝo de s-ro Lintvarev nin veturis sen skuoj, kaj ni ĝuis, apogataj kontraŭ bonegaj kusenoj, la plezuron rapidiradi, tiel ŝatatan en Rusujo. Sed kiom pli alloga devas esti tiu sento, kiam, anstataŭ kaleŝo, la fumanta ĉevaltrio fortiras glitveturilon sur ebena kaj mola tapiŝo de neĝo! Nek bruo, nek polvo, nek malebenaĵoj, nur plena kaj senfina silento sur la senfina blankaĵo. La glitveturilo, ŝajnas forĵetata tra la senlima Spacego...

Ni haltis en Ĉerneĉina, ĉar ni deziris saluti kaj danki nian afablan amikon, patron Vasilij. Sed ni trovis en lia domo nur lian du plej junajn infanojn, kiuj diris al ni, ke ilia patro nun faras diservon. Anstataŭ lin atendi en lia domo, ni preferis ĉeesti tiun ceremonion.

La preĝejo estis plena da kamparanoj. En flanko, grupo de kantistoj diverstone kaj per voĉoj tre ĝustaj kantis la belegajn ĥorojn de la ortodoksa liturgio. Antaŭ la ikonostaso staris parto Vasilij, grava kaj majesta en rigida kaj orumita mantelo, sur kiu disvolviĝis lia longa kaphararo. Apud li, lia plej maljuna fileto, ankaŭ vestata per preĝeja survesto, plenumis la oficon de diserva servisto.

Momente la pastro malaperis post la ikonostaso, kies vualo, falante, kaŝis al ĉiuj la ritan misteron de la komuniiĝo. Kiam li revenis, akompanata de lia fileto, en siaj manoj li tenis orumitan kalikon kun vino, en kiu flosis kelkaj peceroj de pano. Antaŭ ni kliniĝis vico de viroj, virinoj, gejunuloj kaj geknaboj eĉ virinoj, havantaj sur siaj brakoj suĉinfanetojn. Al ĉiuj per longa orumita kulerego li donis la sanktan komuniiĝon. La vereco devigas min diri, ke la suĉinfanoj ne ŝajnis sufiĉe taksi la grandan honoron, al ili faritan. Per energiaj manpuŝoj aŭ kapskuoj kun surdigaj krioj, ili protestis kontraŭ la alproksimiĝo de la timiga kulerego, kiun, kun dolĉa rideto kaj nelacebla pacienco la bona pastro ŝovetis en iliajn buŝetojn.

Post fina kanto al la ĉiopova Dio de la rusa ortodoksularo, la ĉeestantoj ekforiris, kaj mi estis ilin rigardanta, kiam mi rimarkis, duone kaŝatan post flanka pordo de la ikonostaso, mian amikon, filon de l' pastro, kiu faris al mi misterajn signetojn. Ĵus mi devas konfesi, ke jam antaŭe mi estis kaŭzinta kelkajn malatentaĵojn de tiu juna

knabo, kiu multe pli sin okupis pri mia alesto, ol pri sia diserva ofico, kaj sendis al mi de tempo al tempo, ekrigardojn kaj ridetojn. Nun, post mallonga malapero, jen mia amiketo, grava kaj solena en sia preĝeja vesto, portante sur arĝenta plado ion kubforman, paŝas malrapide al mi...

—Ho! kio estas? Mallaŭte diras s-ro Speranskij. Mi divenas: patro Vasilij donacas al vi la panon de la komuniiĝo. Tio estas granda honoro!

Efektive, kliniĝinte ĝentile antaŭ mi, mia amiketo al mi donis la panon, el kiu lia patro estis preninta pecerojn por la komuniiĝo. Mi kisis mian gracian donacinton, nun tre emociatan de sia grava misio, kaj mi kore dankis lian alproksimiĝantan patron. Oni donas tiujn panojn nur al personoj, kiujn oni deziras speciale honori, kaj farante al mi, fremdulo, tiun favoron, patro Vasilij intencis signi al mi siajn estimon kaj simpation.

Ankoraŭ nun mi rigardas tiun tute sekigitan panon, en kiu la pastro boris, por memorigi la dekdu apostolojn, dekdu piktruojn, kaj, meze de ili, tri triangulajn kavetojn, faritajn per ora tranĉilo kiel simbolon de la Tridieco. Mi ĝin zorge konservas kun aliaj memoraĵoj de mia restado en Rusujo, kiujn mi revidas ofte, ĉiam kun plezuro. Vojaĝi donas du feliĉojn, tiun tro rapide pasantan de la vojaĝo mem, kaj tiun, miksatan kun bedaŭro, de la rememoriĝo. Tial vojaĝanto tre similas ripeteman maljunulon, kiu senlace revivigas la estintajn emociojn, por li ĉiam novajn, ne rimarkante, ke li tedas siajn ĉirkaŭantulojn. Sed mi ektimas, ke mi ankaŭ jam enuigis miajn legantojn, tro plezuriĝante en detaloj, eble interesaj nur por mi. Mi povus ankoraŭ paroli pri multaj aliaj ekskursoj, pri la somera teatreto de Sumi, kie mi vidis beletan geknaban feston kun naciaj dancadoj, kaj rusan prezentadon de la sprita komedio de Gogol "Revizoro", kiun Zamenhof poste konigis al la esperantistaro; mi povus priskribi la religian feston pro la naskotago de l' carfilo, kun milita parado de soldatoj, ĵus irontaj en Manĝurujon, ankaŭ la kuriozan ĉiujaran ceremonion de la sanktigo de la akvoj, kiam la sumiana pastraro solene sanktigis la Psjol'on, al kiu, tuj poste, sin ĵetis la simplularo, por trinki la benitan akvon, bani siajn vizaĝojn kaj manojn aŭ plenigi botelojn. Sed sufiĉe estas, kaj venis la tempo por peti de la policestro de Sumi mian pasporton, al li donitan tuj post mia alveno en tiun urbeton. Konforme al la leĝo, tiu potenca funkciulo esploros, ĉu mi pagis miajn monŝuldojn, kaj nur poste skribos forpermeson sur mian pasporton!

Nur de ses semajnoj mi restadas en Rusujo: tamen, kiom da diversaj impresoj dum tiu mallonga tempo! Pri tiu lando, preskaŭ nenion mi sciis antaŭe, nur kelkajn ĝeneralajn, malgravajn eĉ malverajn informojn. Pli ĝustedire, al mi estis malsimpatia antaŭe tiu patrujo de neĝo kaj skurĝo. Kaj jen, dank' al Esperanto, mi konatiĝas kun Rusujo, mi veturas en tiun ŝajne malafablan landon, kaj tie mi eltrovas societon tre apartan, mirinde interesindan, kiu kvazaŭe fermentas en krizo de sia evolucio al modernismo. Ĉe tiu nun aliformiĝanta popolo sin skupuŝas strangaj kontraŭaĵoj, postrestaĵoj de la

apenaŭ ĉesinta servuteco kun "arteli" aŭ kamparaj asocioj laŭ la principo de socialismo;—superstiĉoj indaj je la plej nekultura Mezepoko, kun teorioj de grafo, kiu metas sian idealon en la forigo de ĉiu socia malegaleco kaj reiro al kvazaŭ primitivforma vivado de simpla laboristo;—arĥaika leĝaro, kiu diference administras la homojn, laŭ iliaj klaso kaj religio, kun jam kvazaŭ realiĝantaj postulatoj de antaŭema feminismo per intensa klerigo de la virinoj, kiu estas superata en nenia alia lando. Tie, ĉiuj fundamentoj de nia okcidenta socia ordigo estas kvazaŭ renversitaj: dum la registaro sin apogas sur la principojn de religia aŭtokrateco kaj metas la fonton de ĉiu povo kaj leĝeco nur en la arbitran volon de unu homo, kun la nekonscia helpo de nekleruloj, kiujn tia socistato malutilas, kontraŭe, la favoratoj mem de tiu sociordo, puŝataj de la nevenkebla fonto de la moderna kultureco, revas plilarĝigi tiun kadron, por ke Rusujo povu enspiri larĝbruste la fortigan blovon de la libera penso.

Kio fine eliros el tiu ĥaoso? Bono, mi esperas, se nur la entuziasmaj teoriistoj sufiĉe atentos pri la neceseco de laŭgrada evolucio, por atingi pace praktikan kaj definitivan triumfon. Tion mi tutkore deziras al tiu saĝa kaj nobla gento, kiu, per siaj propraj ecoj, plene meritas prosperon.

VII.

Ne sen forta ĉagreno mi forlasis tiun gastaman urbeton Sumi'n, kie mi estis dorlotata kaj favorata de ĉiuj. Familio Speranskij estis iĝinta kvazaŭ mia mema familio. Kaj maldolĉe mi sentis tiun fatalon de l' forironta vojaĝanto, kiu devas pagi sian plezuron per bedaŭroj, tiom pli fortaj, kiom pli intensa estis lia feliĉo.

Sub la premo de tiu malĝoja sento, mi deziris reiri hejmen kiel eble plej rapide, por konservi pli freŝajn kaj revivigi kviete en mia memoro, la multegajn impresojn de mia vojaĝo. Kiel sata stomako, mia lacega cerbo ne deziris plu novajn nutraĵojn. Sed mia amiko Speranskij postulis, ke mi restadu dum mia reira vojo almenaŭ unu tagon en Kievo. Li pretendis, ke tio "spritigos" mian vojaĝon, ke mi ne povas forlasi Rusujon, post sessemajna restado, ne vizitinte eĉ unu el ĝiaj urbegoj. Li estis prava kaj mi obeis lian postulon.

Tiun viziton mi ne rakontos detale, ĉar jam multaj vojaĝantoj priskribis Kiev'on pli bone ol mi povus fari. Cetere mia spiritsato kaj mia kaplaceco ne permesis, ke mi povu plene ŝati la kuriozaĵojn de tiu ĉefurbo de la antikva Rusujo.

En Kiev estis la unua rusa princo, kiu konvertiĝis je la kristana kredo; kompreneble, liaj korteguloj fervore sekvis tiel altan ekzemplon, kaj oni ĵetis solene en la Dnjepr'on la antikvajn idolojn "perun'ojn". El tio rezultis, ke Kiev iĝis la centro de la Rusa Eklezio kaj pleniĝis da monaĥejoj por la vivuloj, da katakomboj por la mortintoj. Kaj

ĉar la tero de tiuj katakomboj havas la proprecon sekigi kaj konservi la kadavrojn, la popolo kredis, ke tiuj mortintoj estas sanktuloj, kaj nun multaj miloj da pilgrimantoj vizitas ĉiajare kaj riĉigas per siaj donacoj la monaĥojn, kiuj loĝas en tiuj sanktaj lokoj.

Kun gvidisto mi vizitis la multajn preĝejojn, kies kupoloj estas tegmentataj per plataĵoj el oro; mi vidis iliajn nekalkuleblajn riĉaĵojn, iliajn ikonojn, faritajn el arĝento, oro, eĉ el mozaiko de diamantoj, la antikvajn freskojn de sankta Sofio, la mirindajn olepentraĵojn de sankta Vladimiro, verkojn de la plejfamaj nuntempaj artistoj de Rusujo, kiuj laŭ rimarkinda escepto, tie ne kopiis la tradiciajn tipojn de la bizanta sanktularo, sed faris rimarkinde vivoŝajnajn figurojn. Fine, mi, kun sekvantaro de pilgrimantoj, iradis kun kandelo en mia mano, kondukata de fantoma monaĥo, tra la subteraj preĝejoj kaj mallarĝaj katakomboj de la Laŭro, antaŭ niĉoj, kie kuŝis la mumioj de rusaj sanktuloj, sternitaj en riĉaj malfermitaj sarkofagoj. Kelkajn el tiuj kavetoj fermas muro—en ili, piaj anakoretoj entombigis sin vivajn, kiel la "Sachette de Notre Dame de Paris", ricevante sian nutraĵon tra malgranda fenestreto. Post ilia morto, oni nur murŝtopis la fenestreton de l' niĉo. Alia sanktulo, Ivano, laŭ legendo, sin enterigis ĝis sia zono, kaj tiel restadis, ne manĝante dum tutaj semajnoj: kaj, kiel pruvon, la monaĥoj montras al vi lian mumiigitan korpon, duone elstarantan el la tero.

Post tiu funebra promeno, oni plezure spiregas la liberan, helan aeron! Por fini mian tagon; mi decidis pasigi mian vesperon en la publika Komerca Ĝardeno, kiu kuŝas sur altaĵeto super la Dnjepr. Tie, antaŭ bonega orkestro, sidis multnombra ĉeestantaro, en kiu brilis elegantaj virinaj vestaĵoj kaj ĉiuspecaj uniformoj. Sed, ho ve! mia magia esperanto tie ne kunligis min kun tiu amaso de indiferentuloj,—ree multpezis sur miaj ŝultroj tiu lingva izoleco, kiu tiel malĝojigis la komencon de mia vojaĝo. Por forpeli tiun maldolĉan senton, mi forlasis la popolamason kaj iris en pli dezertan parton de la ĝardeno, el kiu oni supervidis la ĉirkaŭantan kamparon.

Kia belega spektaklo! Sub miaj piedoj, la movplena suburbo Podol, kun siaj bazaroj, ĝardenoj kaj verdaj tegmentoj; poste la larĝa kiel markolo kaj majestega Dnjepr, kun siaj insuloj, siaj multnombraj vaporŝipoj; kaj, trans la riverego, strange kontrastanta kun la bruplena kaj vivema urbego, la ebena kamparo, vasta, silenta, preskaŭ dezerta, la stepo de Malgrandarusujo. Sub la lastaj radioj ruĝaj kiel fajrego de l' kuŝiĝanta suno, tiu senfina ebenaĵo sterniĝis, iom post iom, malheliĝis, ŝajnis estingiĝi kaj malproksimiĝi de mi, foriranta vojaĝanto, kiu ĝin rigardadis je la lasta fojo. Fine ĝi tute malaperis antaŭ miaj okuloj. En tiu momento, maldekstre, la sankta monteto Peĉersk, kie estas la preĝejoj kaj katakomboj de Laŭro, subite ekflamiĝis per elektraj lumoj, super kiuj giganta fajra krucego starigis sian potencan kaj regeman simbolon antaŭ la dormanta lando. Al tiu mistera, ne plu videbla kaj por mi plena de karaj memoraĵoj, Ukrajna stepo, mi ĵetis malĝoje mian lastan adiaŭon kaj rapidis al la stacidomo.

.....Senhalte, mi veturadis tra Lwow, Wien, Venezia, Milano, Ĝenova ĝis Marseille. La vojo estas mirinda inter Wien kaj Italujo: montoj, lagetoj, abiaj arbaroj kaj mezepokaj ruinaĵoj vetbatalas por ĉarmi la vojaĝanton; eble neniam plu mi havos okazon por vidi "Venezia la bella", tamen mi estis malpacienca ripozi. Pri tiu tritaga rapidega veturo tra centra Eŭropo, mi do nenion diros, krom unu anekdoto, kiu estos la konkludo de tiu jam tro longa rakonto.

Inter Kiev kaj Wien, mi havis la bonan ŝancon veturi kun tre afabla kunvojaĝanto, berna advokato, s-ro A. B., kiu parolis france tiel perfekte kiel germane. Li ankaŭ ĵus ekskursis en Rusujon por sia plezuro, kaj, kompreneble, ni komunikis unu al la alia niajn impresojn. Li estis vizitinta Sanktpeterburgon, Niĵnij Novgorodon, Moskvon kaj Kievon; tamen, kiam mi rakontis al li mian modestan restadon en la urbeto Sumi, li konfesis, ke mi faris vojaĝon pli interesan ol li.

—Ĉar, li diris, mi vidis urbojn, kuriozajn, certe, sed ĉie domoj, stratoj kaj placoj estis proksimume similaj. La nekonataj homoj, kiujn mi renkontis, estis por mi kvazaŭ fermata libro. Verdire, mi havis rekomendajn leterojn por diversaj personoj, kaj ili akceptis min ĝentile, sed ceremonie. Intimeco ne povis esti inter ni, kaj mi ne eniris, kiel vi, en la internan penson de la rusoj, nek vivadis ilian vivon. Vi, kontraŭe, dank' al via esperantista frateco, tuj amikiĝis kun viaj gastigantoj kaj povis profiti neordinare favoran situacion, kvazaŭ vi estus momente "rusiĝinta".

—Tre vere, mi respondis. Sed kio malhelpas, ke vi lernu Esperanton kaj refaru vian vojaĝon en similaj kondiĉoj?

—Nenio certe, kaj via ekzemplo tentas min. Mi ankaŭ iĝos esperantisto!

Kaj tio ne estis vana promeso. La sekvantan januaron, ni interŝanĝis poŝtkarte novjarajn bondezirojn kaj s-ro A. B. skribis al mi, ke li estas nun esperantisto kaj ke li esperas renkonti min kaj paroli kun mi internacilingve en la Ĝeneva kongreso!

Tia estis la unua rezultato de mia vojaĝo en Rusujon per Esperanto. Povu mia sincera rakonto ankoraŭ elfari novajn adeptojn de nia helpa lingvo, kaj, plie, okazigi multajn eksperimentojn kiel la mia.

Se mi atingos tiun rezultaton, mia celo estos trafita.

A. Rivier.

MOSKVA LIBREJO "ESPERANTO".

26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo.

LA PROPRAJ ELDONAĴOJ.

Plena Esperanto-Rusa Vortaro de D-ro L. L. Zamenhof. Tiu ĉi libro estas la plej plena kaj nova esperanto-rusa vortaro, enhavanta pli ol 12.000 vortojn radikajn, internaciajn kaj derivitajn. Ĝi estas necesega por ĉiu rusa esperantisto kaj utila por alinaciaj esperantistoj. Unu volumo in-16, 152-paĝa — 80 kop. (Sm. 0,85)

Patroj kaj Filoj, romano de J. S. Turgenev, tradukita el la rusa lingvo de D-ro K. Bein. Unu volumo in-8, 168-paĝa — 1 rub. (Sm. 1,06)

En Malliberejo, rakonto de E. Ĉirikov, tradukita el la rusa lingvo de D-ro K. Bein. Unu volumo in-16, 32-paĝa — 10 kop. (Sm. 0,10)

Plena verkaro, libro 3-a, de V. Devjatnin. Kolekto da esperantaj versaĵoj, originalaj kaj tradukitaj. Plena traduko de la poemo de Puŝkin: Ruslano kaj Ludmilo. Unu volumo in-16, 138-paĝa — 65 kop. (Sm. 0,65)

Эсперанто въ 10 уроковъ. Каръ и Панье. Перев. съ франц. языка и дополнилъ примѣнительно къ русскому, Б. Тиличеевъ, подъ редакціей А. А. Сахарова. 1 volumo in-16, 80-paĝa — 20 kop. (Sm. 0,21)

Ключъ къ учебнику "Эсперанто въ 10 уроковъ", сост. В. Н. Девятнинъ. — 15 kop. (Sm. 0,16)

Полный курсъ международнаго языка Эсперанто, сост. Т. А. Щавинскій, 2-е изд. — 60 kop. (Sm. 0,63)

Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj, de A. A. Saĥarov. Kolekto da artikoloj en esperanta kaj rusa lingvoj: *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*, de anonima aŭtoro; *Elementoj de kunfratiĝo de popoloj*, de A. Saĥarov kaj *La unua kongreso de esperantistoj* de Leo Belmont. Kun almeto de — 60 kop. (Sm. 0,63)

Esperanto-Rusa gramatiko, Esperanto-Rusa kaj Rusa-Esperanta Vortaroj. 1 volumo in-8, 176-paĝa

Ĉefeĉ—ŝlosilo por rusoj 2 kop. (Sm. 0,02)

En Rusujo per Esperanto, de A. Rivier 60 kop. (Sm. 0,63)

DEPONEJO DE LA LIBROJ:

Anjo, rakonto de I. Turgenev. El la rusa lingvo tradukis D-ro A. Fiŝer kaj V. Zamjatin 25 kop. (Sm. 0,25)

Rusa-Esperanta Vortaro, verkis D-ro N. Korzlinskij, R. Mencel, G. Smirnov, A. Stupin, trarigardis D-ro L. L. Zamenhof 1 rub. 75 k. (Sm. 1,85)

LA ONDO DE ESPERANTO

ВОЛНА ЭСПЕРАНТО.

Ĉiumonata organo de ruslandaj esperantistoj, eldonata de la jaro 1909.

Ĝi publikigas plenan kronikon de esperanta movado en Rusujo kaj eksterlando, originalajn kaj tradukitajn rakontojn, novelojn, teatraĵojn, versaĵojn, propagandajn, bibliografiajn, kritikajn artikolojn. Ĝi enhavas ankaŭ amuzan (kun premioj), korespondan kaj aliajn fakojn.

En ĉiu numero aperas portretoj de konataj esperantistoj.

Estas organizataj literaturaj konkursoj.

Al kunlaborado ĉiam estas altirataj la plej bonaj esperantaj verkistoj.

Jara abonprezo kun senpage aldonitaj libroj
2 rubl. (2,120 Sm.).

Redakcio kaj Administracio: Moskvo (Rusujo), Tverskaja, 26.

Teksto de librokovrilo:

A. RIVIER.

EN RUSUJO

PER ESPERANTO.

MOSKVA LIBREJO "ESPERANTO".

26, Tverskaja, 26, Moskvo, Rusujo.

Bohemujo, F. TOPIC, Ferdinandova 11, PRAHA.—**Brazilio**, FR. ALVES Y Ca, 166, rua do Ouvidor, RIO DE JANEIRO.—**Danujo**, HÖST & SÖN, Bredgade 35, KJÖBENHAVN.—**Francujo**, LIBRAIRIE HACHETTE & Cie, 79, Boulevard Saint-Germain, PARIS; Librairie de l' Esperanto, G. WARNIER & Cie, 15, Rue Montmartre, PARIS. **Germanujo**, MÖLLER & BOREL, Lindenstrasse 18-19, BERLIN S. W.—**Granda Britujo**, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON W. C.—**Hispanujo**, J. ROSALS, Puerta, 30, BARCELONA.—**Hungarujo**, KOKAI LAJOS, Károly-utca I. sz., BUDAPEST, IV.—**Svedujo**, C. E. FRITZE, Fredsgatan, STOCKHOLM.—**Svisujo**, UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO, 10, Rue de la Bourse, GENÈVE.—**Usono**, AMERICAN ESPERANTIST Co., Fortieth street 235, CHICAGO, kaj FLEMING H. REVELL, Co, 158 fifth Avenue, NEW-YORK.

Prezo 60 kop. (Sm. 0,63).

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK EN RUSUJO PER ESPERANTO ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE